


# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 6/2006



*Esperanto Elektronike* estas DVD, kiu prezentas Esperanton per kursoj, vortaroj, fotoj, filmo kaj multo plia, aĉetebla de la libroservo. La menuoj kaj granda parto de la informoj troviĝas finlingve. Ĝi funkcias en novaj komputiloj, ne per portelevidaj DVD-ludiloj. Prezo 9 eŭroj.

Societoj kaj mendantoj de pluraj ekzempleroj ricevas rabaton. Kontaktu la libroservon en la EAF-oficejo aŭ je [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi).

*Esperanto Elektronike*, esperantoa esittelevä DVD, jossa kursseja, sanakirjoja, valokuvia, filmi ja paljon muuta, on ostettavissa esperantoliiton kirjamyynnistä. Valikot ja suuri osa tiedoista suomeksi. DVD toimii uusissa tietokoneissa, ei television DVD-soittimissa. Hinta 9 euroa.

Yhdistyksille ja usean kappaleen tilaajille annetaan alennus. Kirjamyynnin yhteystiedot ovat samat kuin esperantoliiton toimiston tai [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

## Jubileaj informoj, p. 14, 19-20, 22-24

Tyney Leivo-Larsson, p. 6 ♦ Grafino-libro recenzita, p. 27

Renato Corsetti, p. 23 ♦ Vintraj Tagoj – Talvipäivät, p. 15

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

tuomo.grundstrom

*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

*Marjaliisa Parpala*, Utinkatu 45 B 7, 45200 Kouvola. ☎ 040 717 4521

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



## Por ke ĉiu ricevu inviton: Ni retrovu la esperantistojn!

La jubilea skatolo daŭre invitas al la jubilea tago en Helsinko – kaj al tutjara partopreno. Same faras mi kaj la tuta estraro. Same faras multaj aktivuloj kaj ordinaraj klubanoj. Jam en aŭgusto en la Universala Kongreso mi renkontis personojn de foraj landoj, kiuj bone sciis pri nia 100-jariĝo: “mia korespondantino invitis min veni” aŭ “la UK en Tampere estis la plej bone organizita iam ajn – mi aŭdis ke vi organizos festivalon dum via jubilea jaro”.

Sed kiel stas pri la ne plu aktivaj esperantistoj en nia propra lando? Estas tempo akcepti la defion trovi tiujn kiuj ne plu pagas kotizon – eble pro malatento aŭ portempa okupiĝo pri familiaj kaj laboraj devoj – kaj tial ne povas legi tiujn ĉi vortojn. Pli konkrete: se vi konas personon, kiu scias esperanton, kiu eble ne legas tiujn ĉi vortojn, ne hezitu tiun personon kontakti por inviti al nia festado! Ni volonte sendos senpagan numeron de Esperanta Finnlando al la koncerna persono, eventuale kun salutoj de vi. Ni ankaŭ deziras fortigi nian varbadon de membroj, de novaj kaj de malnovaj. Ĉi-numere troviĝas pluraj instigoj al membriĝoj (Societo Nino Runeberg, Individua Membro de UEA). Ĉu ni sukcesos kreski plurmaniere?

La ĉefa festa evento estas la jubilea tago en Helsinko la 28an de aprilo 2007. Ni volas vidi vin ĉiujn tie, kunludante en la urbo kaj solene festante en la Noblera domo. Tial la antaŭtagmeza programo estas senpaga – aŭ preskaŭ, eventuale simbola prezo por kvizpromena demandaro – kaj la plej gravaj tri horoj de la jaro,

la solena festo je 14-17, havas tre moderan kotizon je 15 eŭroj. Ni konsideris ĉu ĝi estu tute senkotiza, sed konkludis ke la kotizo pagos por la variaj kostoj (servado de tosto, kafo kaj jubilea kuko). Tiuj festantoj, kiuj restos por la solena bankedo (triplada, verŝajne je 18.30-22) estas instigitaj kontribui ankaŭ al la programaj kaj eĵaj kostoj per 100 eŭroj (inkluzivas ambaŭ festojn), familiaj kaj aliaj rabatoj rekomenditaj. Sekvanumere pliaj informoj, programo kaj menuo.

La celoj de la antaŭtagmeza programo estas konatigi esperanton kaj la asocian jubileon en la urbo. Nia festo estu videbla! Tial ni estu multaj. Kaj la programo vokas intereson. Ĉu vi jam renkontis prezidanton Nino Runeberg? Kie vi lin trovos? Verŝajne en adreso de grava okazejo de ekzakte antaŭ 100 jaroj – kaj ĉe la universitato profesoron, ĉe la parlamentejo iaman ELFI-sekretarion, ĉe la malfermejo de la UK 1969 alian virinon jam prezentitan en nia historia serio. La historiuloj volonte helpas pri la respondoj, alternativoj 1 X 2, premioj lotumotaj. La kvizo estas por esperantistoj – kaj por ĉiu ajn. Aparte ni celas instigi grupojn ligitajn al niaj fakasocioj (blindulojn, skoltojn, lernejojn/instruistojn).

Legu ankaŭ pri festivalo Arta Lumo ĉi-numere kaj en la sekva! La festivalo estas krom ĝuinda kultura evento, bona okazo por renkonti malnovajn geamikojn de la tuta mondo – aŭ por (re)lerni la lingvon!

*Anna Ritamäki*



## Kio post la angla?

En pasinta oktobro la nova prezidento de Estonio kaj la nova ĉefministro de Svedio faris siajn unuajn oficajn vizitojn en Finnlando. En ambaŭ vizitoj okazis, male kiel

kutimis antaŭe, ke la vizitantoj parolis kun finnaj politikistoj kaj redaktistoj en la angla lingvo. Antaŭe la finnoj tradicie parolis kun la svedoj svedlingve kaj la estonoj parolis la finnan.

La ŝanĝo apenaŭ estas definitiva decido – certe plejparto el finnaj politikistoj kaj multaj finnaj redaktistoj daŭre kapablas la svedan sufiĉe por uzi ĝin, kaj povas esti, ke Estonio denove ricevos prezidenton, kiu parolas la finnan – sed ĝi kongruas kun klara tendenco de la nuna mondo. La angla estas la ĝenerala komuna internacia lingvo en tre granda parto de la mondo. Ne ĉie tiom klare kiom en Nord-Eŭropo, sed en diversaj partoj de la mondo pli kaj pli ĝenerale.

En Nord-Eŭropo verŝajne jam plejparto el homoj pensas, ke la angla estas la sola lingvo, per kiu indas provi paroli kun eksterlandanoj. Mi parolas la anglan apenaŭ pli bone ol la svedan, sed kiam mi estas en Svedio, tamen ofte okazas, ke svedo, kiu scias aŭ rimarkas, ke mi estas eksterlandano, preferas paroli al mi angle, kvankam mi ekde komenco parolis svede. Rezultas konversacioj pli-malpli tiaj, ke la svedo diras al mi ĉion en la angla, kaj mi diras miajn respondojn en la sveda.

Multaj finnoj jam de longa tempo eĉ postulas, ke la nordia kunlaboro okazu per uzo de la angla. Tiel ja estus pli egale, tute same kiel ni ofte argumentas pri Esperanto: neniu havu avantaĝon pro paroli sian denaskan lingvon kun alilingvanoj.

Oni ja povas konsideri argumentojn pro egaleco pri la uzo de la angla internacie. Nur 7 %

el la loĝantaro de la mondo parolas la anglan lingvon denaske, kaj tiu proporcio nur malkreskas, ĉar neniu el grandaj anglalingvaj landoj estas regiono de forta kresko de populacio. Do, se ĉio internacia kunlaboro okazas per la angla, tiam plejparto el la internacia lingvouzo okazas per egaleca bazo.

Multe malpli bona egaleco ja estas, se oni obeas tian regulon, ke en kunlaboro de najbaraj landoj kutime la parolantoj de la malpli granda lingvo lernu la pli grandan lingvon. Tiel ja efektive estas, se finnoj kaj svedoj interparolas en la sveda kaj finnoj kaj estonoj en la finna.

Nu, la angla neniel estas perfekte egaleca solvo, ne ankaŭ ene de nordia kunlaboro, ĉar loĝas denaskaj angleparolantoj ankaŭ en la nordiaj landoj, kaj diversaj kvantoj da ili en diversaj landoj. Sed same ankaŭ ne Esperanto estas perfekta pro egaleco, ĉar ekzistas denaskaj parolantoj de Esperanto. Oni povas akiri Orwell-ozan konkludon, ke ĉiuj lingvoj povas esti egalecaj, sed iuj lingvoj estas pli egalecaj ol iuj aliaj...

Kiel aludis Jukka Pietiläinen en la lasta numero de nia gazeto, referinte prelegon de Jouko Lindstedt en la centjariĝa festo de EKH, ni esperantistoj emas dubi aŭ rekte nei la eksterordinaran rolon de la angla en la nuna mondo. Oni ja renkontas asertojn, ke la angla ne estas tiom evidenta internacia lingvo, kiom estis iam latino, aŭ iam la franca.

Mi tamen pensas, ke ne ekskluzive nur esperantistoj asertas tion. Same iam parolis mia gimnazia instruisto pri historio, kaj laŭ mia scio li ne estis esperantisto, kaj tio estas preskaŭ certa scio, ĉar certe li almenaŭ en tiu kunteksto estus aludinta pri Esperanto, se li estintus ĝia adepto. Nu, tio estis en komenco de la naŭdekaj jaroj, kaj ĉu tiu instruisto nun estus ĝisdatiginta sian opinion pri la internacia rolo de la angla, tio restas enigmo, ĉar li mortis jam antaŭ multaj jaroj.

Latino ja estis la ĝenerala lingvo en la roma imperio, kiu en sia pleja vasteco ampleksis preskaŭ la tutan konatan mondon (konatan por ĝiaj propraj loĝantoj), kaj post la disfalo de la roma imperio ĝi en eŭropaj universitataj kaj ekleziaj sferoj dum jarmilo restis la internacia lingvo. Sed ekster Eŭropo kaj mediteraneaj bordlandoj latino estis apenaŭ konata lingvo, en tutmonda kaj tutsocia skalo ĝi certe ne estis tiom vaste uzata kiom la angla nun.

Ĉu do la rolo de la angla signifas, ke Esperanto definitive perdis sian ŝancon? Aŭ, alimaniere esprimite, ke la mondo perdis bezonon pri Esperanto? Mi pensas, ke ne. Fenomenoj, kiom ajn vastaj en sia pinta fazo, tendencas velki. Bestaj kaj plantaj specioj disvastiĝas kaj ekstermiĝas, epidemioj aperas kaj malaperas, homaj kulturoj kaj inventaĵoj ekkutimiĝas kaj forgesiĝas. Pri la kaŭzoj oni povas prezenti pli aŭ malpli bonajn divenojn, sed mi kredas, ke iam ankaŭ la angla lingvo foriĝos el la stato de ĝenerala internacia lingvo, kvankam ĝi intertempe povos iĝi ankoraŭ pli ĝenerala ol nun.

Mi asertas, ke la nuna internacia stato de la angla povos eĉ pretigi la vojon al ĝenerala uzo de Esperanto. Nun homoj ja spertas en granda parto de la mondo, kiel estas simpla afero, ke anoj de diversaj nacioj povas en siaj renkontiĝoj interkompreni per la angla. Sekva fazo tute bone povus esti, ke la homaro spertas, aŭ antaŭvidas, malaperon de la angla el tia rolo – kaj ekkomprenas, ke povos esti ankoraŭ pli simple!

*Mikko Mäkitalo*

## La ĉefredaktora retadreso ŝanĝiĝas

Mi ekde nun uzos retpoŝtan adreson *mmakita@utu.fi* por redaktado de la gazeto. La malnova *ef\_redakto@surfeu.fi* ne plu funkcios post fino de tiu ĉi jaro.

*Mikko Mäkitalo*

## Kiu en Finnlando preferas la anglan?

En Finnlando la uzon de la angla en nordia kunlaboro subtenas organizo, kies nomo estas *Suomalaisuuden Liitto* (=Asocio de finneco). Ĝi havas iom malpli ol mil membrojn kaj eldonas gazeton *Suomen Mieli* (=Animo de Finnlando) trifoje en jaro en preskvantoj de 2500–5000 ekzempleroj. Oni en la gazeto esprimas ofte opiniojn, ke la forta stato de la sveda lingvo en Finnlando estas restaĵo de kolonia tempo, kiun indus forigi. Aliaj ĉefaj postuloj de *Suomalaisuuden Liitto* estas:

- Oni ĉesu la nun devigan instruadon de la sveda lingvo al ĉiuj en finnaj lernejoj.
- La ŝtato komencu diskutojn kun la najbaraj landoj por reciproka organizado de cirkonstancoj por minoritataj lingvoj.
- La sola oficiala lingvo de Finnlando post transira periodo iĝu la finna. La rajtojn de minoritatoj oni garantiu regione.

*Mikko Mäkitalo*

## Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 11an de marto, 2007 je la 10a horo en kunveno de hotelo Seurahuone, Keskuskatu 21, Kotka. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 11.3.2007 klo 10.00 alkaen hotelli Seurahuoneen kokoustiloissa, Keskuskatu 21, Kotka. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte söndagen den 11.3.2007 kl. 10.00 i hotell Seurahuone, Keskuskatu 21, Kotka. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

*La estraro – Hallitus – Styrelsen*

## Esperantisto kaj diplomato

**Työne Leivo-Larsson** (1902-1977) estas eble la plej konata el finlandaj esperantistoj, sed malmultaj ne-esperantistoj konas ŝin kiel esperantiston. Tamen ŝi komencis lerni esperanton jam en 1921 kaj estis esperantisto ĝis la fino de sia vivo. Kiel aktiva politikisto ŝi ne estis tiom aktiva en esperanto-movado.

Tamen ŝi aperas sur la listo de 100 plej gravaj esperantistoj, kiu aperis en Ondo de Esperanto 5/2002. La listo prezentas ŝin kiel "Ambasadoro kaj ministro, eble la unua virino kiu sidis en ŝtata respublika registaro." En tio estas tamen eraro, ĉar ŝi eĉ ne estis la unua virino en registaro en Finnlando. Tamen la afero ĝustas, se ni anstataŭas la vorton "sidis" per vorto "prezidis". Nome kiam ŝi estis vicĉefministro en 1958 ŝi prezidis registaron dum la foresto de ĉefministro kaj estis la unua en Norda Eŭropo en tiu rolo.

La mencioj pri ŝia esperanta agado estas relative fragmentaj. En sia taglibro el jaro 1921 ŝi



*Työne Leivo-Larsson. Bildo: Työväen Arkisto (Laborista Arkivo).*

rakontas ke ŝi estis en kunveno de esperantista frataro kaj ke ŝi provas lerni dum la somero multe, tiel ke ŝi atingas la nivelon de la aliaj. En Universala Kongreso de 1922 ŝi prizorgis loĝigon de kongresanoj.

En 1920-aj jaroj en Helsinko funkciis grupo aŭ societo kun nomo "Esperanta Kulturo". Al ĝi apartenis i.a. Vilho Setälä kaj Työne Leivo, kiu funkciis kiel kasisto de la grupo. En 1924 Työne Leivo prelegis en tiu grupo pri temo "Feminismo".

Enciklopedio de Esperanto el jaro 1934 informas, ke la komuna hejmo de du virinoj, Elmi Tamminen kaj Työne Leivo, funkciis kiel "gastama renkontejo de esperantistoj dum multaj jaroj, kiam kluba vivo en Helsinko ne ekzistis". Elmi Tamminen estis instruisto, prezidanto de ELFI kaj estrarano de EAF. Työne Leivo ankaŭ helpis en kompilado de Enciklopedio de Esperanto (1933), i.a. la artikolon pri Finnlando. Ŝi estis ankaŭ estrarano de ELFI.

En 1937 Työne Leivo edziniĝis kun Bror Nils Larsson. En 1948 ŝi estis elektita al Finnlanda parlamento kiel socialdemokrato kaj ŝi fariĝis tuj ministro pri socialaj aferoj. Ŝi estis ministro en diversaj registaroj ĝis 1958, kiam ŝi fariĝis ambasadoro de Finnlando en Oslo. Inter socialdemokratoj ŝi estis unu el fruaj subtenantoj de Kekkonen kaj unu el gvidantoj de opozicia movado ene de Socialdemokrata partio. Ŝi estis ankaŭ prezidanto de socialdemokrata virina ligo. Ŝi fariĝis ambasadoro el ekster la diplomataj rondoj, kaj ŝia subteno al Kekkonen gravis en tio.

Inter 1958 kaj 1965 ŝi estis ambasadoro en Oslo. Ŝi estis la unua virina ambasadoro de Finnlando. La paperoj pri esperanto de ŝia arkivo en Laborista arkivo enhavas informon ke en Oslo ŝi ankaŭ prelegis en esperanto-klubo de Oslo. En 1965 ŝi revenis al Finnlando kaj en 1966 estis denove elektita al parlamento de soci-

## Esperanto en finnlandaj arkivoj

En multaj arkivoj de Finnlando estas diversaj materialoj, kiuj rilatas al historio de Esperanto-Movado. Foliomado de malnovaj materialoj naskas firman ideon, ke estus tre utile konservi diversajn protokolojn, leterojn (eĉ personajn) kaj aliajn materialojn, kiuj rilatas al Esperanto, kaj donaci ilin al iu arkivo.

En Nacia arkivo en Helsinko estas bone ordigita kaj relative kompleta la arkivo de Pacifista Esperanto-Ligo el 1930-aj kaj 1940-aj jaroj. Ili troviĝas inter materialoj de Finnlanda Pac-ligo (Suomen Rauhanliitto), kies membro la Esperanto-ligo estis. La materialoj estas parte en Esperanto, parte en la finna.

Tre kompleta kaj bone ordigita estas ankaŭ la materialo de Finnlanda sekcio de Kristana Esperanto-Ligo Internacia. Pluraj skatoloj enhavas materialojn el fruaj jaroj de kristana esperanto-agado, en 1920-aj jaroj, kiam kristana esperanta gazeto, Kristana Espero, estis redaktata en Finnlando. Tie estas ankaŭ tre kompleta materialo de post 1962, kiam la sekcio estis refondita. Troviĝas i.a. membrolistoj, protokoloj, leteroj, gazetoj kaj eltondaĵoj el finnaj gazetoj. Inter ili troviĝas ankaŭ materialoj pri la organizo

de KELI-kongreso en Jyväskylä en 1988, inkluzive leteroj.

Inter materialoj de Tyyne Leivo-Larsson en Nacia Arkivo estas ŝiaj taglibroj el jaroj ĉ. 1920. Tamen en ili estas nur malmultaj mencioj pri Esperanto. Tamen informo, ke ŝi komencis lerni Esperanton printempe 1921 kaj partoprenis someran renkontiĝon de laborista esperanto-klubo.

En Nacia Arkivo estas ankaŭ dokumentoj pri malfonditaj esperanto-societoj, sed ili kutime havas nur formalajn dokumentojn pri statuto kaj nomojn de prezidanto, sekretario kaj kasisto, sed ne pli. Tamen estas interese informiĝi, kiuj estis la fondintoj (eblas vidi ankaŭ naskiĝjaron kaj profesion de unuaj estraranoj).

En Laborista Arkivo (arkivo de socialdemokrata partio kaj laborista movado) estas materialoj de Finnlanda Laborista Esperanto-Asocio (FLEA). Ili estas plejparte de 1930-aj jaroj ĝis 1950-aj jaroj. Estas protokoloj, cirkuleroj, gazetoj kaj leteroj. Parto el materialo temas pri membro-societoj de la asocio, ekzemple en Viborgo kaj en Helsinko. Estas ankaŭ leteroj el eksterlando, i.a. de Sovetio kaj de A. Lanti el SAT ▷

aldemokrata opozicia partio Social-demokrata ligo de etkampuloj kaj laboristoj, kiun ŝi reprezentis en parlamento ĝis 1970.

Post reveno al Finnlando ŝi aktivis en esperanto-movado en Helsinko.

Esperanta Finnlando 6/1967 informas ke "verŝajne tre baldaŭ komenciĝos kurso de esperanto por parlamentanoj. La movforto de ĉi tiu grava entrepreno estas parlamentano, ministro Tyyne Leivo-Larsson. Laŭ provizoraj informoj instruos magistro Kolari."

Esperanta Finnlando rakontas ke "la kvinan de aprilo 1968 prezidanto Urho Kekkonen donis aŭdiencon al delegacio de EAF, kiu petis lin

akcepti la postenojn de Alta Protektanto de la 54-a Universala Kongreso de Esperanto. Prezidanto Kekkonen konsentis la peton. Al la delegacio apartenis profesoroj Vilho Väisälä kaj Erkki Kääriäinen, parlamentano Tyyne Leivo-Larsson kaj magistro N.G. Narvala."

En universala kongreso de Esperanto en Helsinko en 1969 Tyyne Leivo-Larsson estis membro de honora komitato kaj ankaŭ prelegis pri Sociala politiko en Finnlando, kvankam tiu programero ne troviĝas en la oficiala programo en la kongresa libro. Ŝi ankaŭ invitis kelkajn esperantistojn al sia hejmo dum la kongreso.

*Jukka Pietiläinen*

(Sennacieca asocio tutmonda).

Apartan skatolon pri Esperanto havas ankaŭ ampleksa arkiva materialo de Tyyne Leivo-Larsson en Laborista arkivo (pli ampleksa ĉi-tie ol en Nacia arkivo). Tie troviĝas ankaŭ esperantaj materialoj de ambasadoro, parlamentano kaj ministro Tyyne Leivo-Larsson. Ili temas plejparte el periodo de 1966 ĝis 1970-aj jaroj. Inter materialoj estas cirkuleroj de Esperanto-Klubo de Helsinki, ELFI kaj EAF. Estas ankaŭ teksto de ŝia prelego en Universala Kongreso en Helsinki. Krome estas i.a. informoj pri tio ke ŝi prelegis en Esperanto-klubo de Oslo kiam ŝi estis ambasadoro tie.

En Popola arkivo (arkivo de Popoldemokrata movado) estas materialoj de Laborista Esperanto-klubo Stelo de Lahti. Ili estas ekde fondo de la klubo en 1938 ĝis 1940-aj jaroj. Tie troviĝas i.a. membrolistoj, protokoloj, leteroj kaj cirkuleroj de FLEA.

En arkivo de Ministerio pri eksteraj aferoj estas aparta dosier-numero pri Esperanto. Ĝi rilatas al intelekta kunlaboro ĉe Ligo de Nacioj kaj eventuale havas dokumentojn pri traktado de Esperanto en Ligo de Nacioj en 1920-aj jaroj. Mi ankoraŭ ne vizitis ĝin.

Ankaŭ ekster Helsinki estas interesaj arkivoj. En regiona arkivo de Meza Finnlando en Jyväskylä troviĝas arkivo de Esperanto-klubo de Jyväskylä. Tri skatoloj enhavas i.a. cirkulerojn de Esperanto-Asocio, dokumentojn pri la agado de la klubo kaj plurajn leterojn.

Apud arkivoj utila fonto por esploristoj estas ankaŭ Universitata biblioteko de Helsinki. Tie troviĝas gazetoj kaj libroj presitaj en Finnlando (la samajn aferojn havas ankaŭ universitataj bibliotekoj de Turku, Jyväskylä kaj Oulu). Tamen eĉ tie troviĝas mankoj: mankas kelkaj numeroj de iuj gazetoj kaj kelkaj kopiitaj cirkuleroj kaj informiloj tute ne troviĝas en tiuj kolektoj. Indus konservi ankaŭ gazetojn kaj cirkulerojn kaj doni ilin al arkivoj kaj bibliotekoj.

Mi forte rekomendas al aliaj Esperantokluboj doni siajn arkivajn materialojn, inkluzive ankaŭ

privatajn leterojn, al iu arkivo. En arkivoj materialoj konserviĝas pli bone kaj ili estas atingeblaj por esploristoj. Eta problemoj estas, ke kopioj en arkivoj estas kutime multekostaj.

En iuj historiaj libroj estas ankaŭ interesaj mencioj pri Esperanto. Unu el la plej bonaj estas la unua volumo de Historio de Laborista Sporta Ligo. Esperantisto V.J. Kostianen estis oficisto de Laborista Sporta Ligo en 1920-aj kaj 1930-aj jaroj kaj ofte kiam lia nomo estas menciata en la libro, estas ankaŭ mencio pri Esperanto. Li i.a. instruis Esperanton al aliaj oficistoj post laborhoroj. Alia libro kun kelkaj Esperantomencioj estas nova libro pri fratoj Väisälä (*Oman tiensä kulkijat*, Otava 2004) Ankaŭ protokoloj de Socialdemokrata partio el 1920-aj kaj 1930-aj jaroj havas referencojn al Esperanto.

*Jukka Pietiläinen*

---

## Festivalo en Västerås

Ne granda okazaĵo, tamen evento, estis Språkfestival (Lingva Festivalo) sabate la 14-an de oktobro en la sveda urbo Västerås, 110 km okcidente de Stokholmo. Aranĝita de la societo FolkeNs Park, kies animo estas la konata esperantisto Wim Posthuma, kaj apogata de la studorganizaĵo ABF, la Festivalo okazis en la belaj ejoj de la urba biblioteko.

Estis dudeko da tabloj kun materialoj kaj viva prezentanto de lingvoj de esperanto ĝis araba, kaj tabela prezento de la gramatika strukturo de tiuj lingvoj. La tabela ekspozicio estas uzebla ankaŭ poste. Estis folkloraj muziko- kaj danco-prezentaĵoj, kaj mia svedlingva prelego pri diferencoj inter lingvoj skandinavaj kompare kun finn-ugraj, kun posta diskuto. Aŭskultis kelkdeko da interesitoj. Jam vendrede okazis akademia podia diskuto pri plurkultureco kaj dulingvismo en Mälardalens Högskola, kiun mi partoprenis per skriba komentario.

Partoprenis la aranĝon dekkvar esperantistoj, kaj estis klubkunveno kun gastoj.

*Tuomo Grundström*



## Arkones -06

Artaj konfrontoj en Esperanto, Arkones, ankaŭ ĉi-jare tradicie allogis multajn renomajn Esperantistojn en la polan urbon Poznań, en la lernejon Lejery, por pasigi semajnfinojn 29.9.–1.10. en la amika nestreĉita etoso. Ĉi-jare partoprenantoj alvenis entute 228 el 22 landoj.

Ĉar ĝuste en septembro estis forpasinta William Auld, la skota verkisto, poeto kaj tradukisto, honore al lia vivo kaj laboro en la Esperantujo oni organizis sepmembran interparoladon (Chmielik, Ertl, Korĵenkov, Ligeza, Tifonĉovski, Wells, Galor). La spritan interparolon gvidis Galor. La plej konata el la verkoj de Auld ŝajne estas por la ordinara Esperantisto: *Paŝoj al plena posedo*. ([http://en.wikipedia.org/wiki/William\\_Auld](http://en.wikipedia.org/wiki/William_Auld))

La programo de Arkones estis interesa kaj abunda. Ĉiu partoprenanto povis elekti, kion taksis por si la plej taŭga kaj interesa el la amasa prezento. Krom la prelegoj, kiuj estis multnombraj kaj interesaj, oni povis ĝui ankaŭ la diversan kaj altkvalitan muzikan programon. Pri tiuj indas mencii ekzemple la kantadon de Georgo Handzlik kaj la muzikadon de Jomo. La vesperdormemaj, kiel mi, eble perdis parton de la etoso, ĉar la dancadon oni ŝajne daŭrigis post la tradicia mielvespero ĝis nekonata nokta tempopunkto.

Pri la prelegistoj mi eble ĉi-tie mencias nur du: Tomasz Chmielik kaj Ranieri Clerici, kvankam estis multaj aliaj notindaj. Tomasz Chmielik unue prelegis pri la forgesita juda bardo el Krakovo – Mordechaj Gebirtig. En sia prelego li kondukis la aŭskultantojn en la antaŭmilitajn malnovajn judajn kvartalojn kaj en la judpopolan vivon en Krakovo, sorĉante en niajn mensojn la imagon pri tio, kia la vivo tie iam estis kaj kia ĝi post la detruo neniam plu estos. La motivo de lia dua prelego estis la Esperanta fi(k)vortaro, kiun li prilaboradas kaj kiu iam estonte aperos por la plenkreskaj senantaŭjuĝuloj. Ĉu ne Esperanto eĉ ĉi-homa flanke devas esti komparebla



kun la naciaj lingvoj?

Ranieri Clerici, emerita itala inĝeniero, tiel suverene prelegis pri renesanco en Italio, ke mi taksis lin kvazaŭ universitata arta profesoro, ĉar li eĉ aspektis tia. Li kun lumbildoj prezentis al ni sian imagon pri la karakterizaj trajtoj en arkitekturo, skulptarto kaj pentroarto dum la renesanco. En sia dua prelego li traktis la temon: Lingva egalrajteco, lingvaj rajtoj, lingvaj homrajtoj; klarigante la lingvajn konceptojn. (<http://eo.nitobe.info/ar/prezento.php?id=38>)

La libroservo vigle negocis. Oni aĉetis librojn kaj mendis gazetojn. Mi aĉetis i.a. la libron *Ŝvejk* de Jaroslav Hašek, tradukita de Vladimír Váná. La libro, kiun espereble ĉiu konas kaj legis, estas eĉ en la Esperantigita formo ege ĝuinda, aŭ eble Esperanto igas ĝin eĉ pli ĝuinda. Parton de ĝi mi ĉiutage legas por reteni la bonan humoron. ([http://wikipedia.org/wiki/Jaroslav\\_Ha%C5%A1ek](http://wikipedia.org/wiki/Jaroslav_Ha%C5%A1ek))

Ankaŭ la Arkones-urbo Poznań situanta en la okcidenta Pollando estas vizitinda kaj trajne atingebla de Varsovio nur en tri horoj. Tie vivas preskaŭ 0,6 milionoj da homoj. Ĝi do estas egale granda al Helsinko, kaj ĝi estas la kvina granda urbo en Pollando. Ĉiutage je la tagmezo kolektiĝas turistoj ĉe la katedralo por rigardi la spektaklon en la katedrala turo. Malfermiĝas la pordetoj kaj du kaproj kornumas unu la alian. Aliaj vidindaĵoj estas ekzemple la malnova urbo kaj la Tumski-insulo. (<http://www.cs.put.poznan.pl/poznan/>)

Bruno Lehtinen

## Renkonto de du generacioj apud Prago

Estis vera plezuro kiel laiko partopreni 2006-11-10/12 fakan konferencon konatan sub la mallongigo KAEST, kiu venas de la vortoj Konferenco – Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. 56 ĉeestantoj el 11 landoj kaj 3 kontinentoj ĝuis semajnfine pri 16 altkvalitaj prelegoj. La kunvenejo situas ĉe la ĉefurbo Prago en Dobrichovice, kie funkcias ankaŭ tre konata kaj prestiĝa eldonejo KAVA-PECH. Necesas tuj substreki, ke pri ĉio respondecis kaj ĉion brile mastris d-ro Petro Chrdle, kiu ne nur sian talenton, sed ankaŭ sian varman koron donacis al la tuta aranĝo kaj al ĉiuj konferencanoj. Hejmeca, varma kaj entuziasmiga atmosfero regis. Atente oni sekvis prezentadojn kaj de junaj, kaj de veteranj fakuloj.



*Jorma Ahomäki el Turku, Detlev Blanke el Berlino kaj Jiri Patera el Prago.  
Ĉiuj fotoj de Petro Chrdle.*

Ĉefa temo de la konferenco estis *Lingvo kaj interreto*, sed krome oni prezentis studojn el diversaj fakoj. Brile kaj en flua Esperanto prezentis sian temon “Unikodo – Esperanto de Interreto” juna studento Marek Blahuš el Ĉeĥio. Tre talente liaj fingroj ludis sur komputila klavaro kaj li montris praktike, ke ne mankas skribsignoj. Tamen nur veraj fakuloj kapablas ilin ĉiujn utiligi. Publiko dankesprimis al li kun forta aplaŭdo.

Interese estis vidi kaj konstati, ke juna generacio plugas fruktodone novajn sulkojn. “Lingvo de retaj reklamo kaj merkato” estis alloga temo de junulino Alla Kudryashova el Rusio. Estis ŝia unua oficiala prelego en Esperanto. Ĉio sukcesis glate kaj estis facile sekvi ŝian klare formulitan prezentadon kun simpatia elokucio.

Ne eblas ĉi tie mencii ĉiujn en la programo notitajn prelegantojn. D-ro Detlev Blanke el Germanio traktis defiojn koncerne bibliotekojn kun esperantlingvaj kolektoj. Oni devus por stabiligi la situacion de la Esperantaj bibliotekoj registri ĉiujn iom gravajn kolektojn. Necesus internacia komisiono, kiu kompilu bazan dokumenton pri la situacio, kiu estu aktualigata de tempo al tempo. Miroslav Malovec traktis lernolibron pri maŝinelementoj. La verko ĝis nun restis nur en manuskripta formo, sed estus grave konservi ĉi tiun riĉan terminologian materialon. La laboro postulas persistan agadon, nepre plenumindan. Fortojn al nia laborformiko Miroslav Malovec.

Programinformilo de KAEST estis trafe kompilita. Pri ĉiu prelego ĉefa enhavo estis jam anticipe prezentita lige kun la konferenca horaro. Estis ĝojiga fakto renkonti ĝisfunde preparitajn detalojn programajn. Petro Chrdle regas organizajn defiojn kaj kiel paca fajrovidanto li tre celkonscie kaj ekzakte estris siajn prelegkanonistojn – se oni ĉi tie permesas perkoloro ornamitajn vortojn.

La konferenco unuanime prezentis sian fortan apogon al esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio pere de Eksterlanda Ministerio en Varsovio. Dankon varman meritas la tuta organiza kaj plenuma grupo. Entuziasma kaj kun novaj ideoj mi revenis hejmen. Akompanis min du luksaj verkoj eldonitaj de KAVA-PECH kaj aĉetitaj en la libroservo de KAEST: Ŝvejk de Jaroslav Hašek kaj Biblio. Ambaŭ apartenas al la serio Oriento-Okcidento. Fiere mi metis ilin sur hejman librobretaron kaj avide komencis studi ilin.

Baldaŭ estos eldonita la prelegkolekto, en kiu ĉiun prelegon/artikolon sekvos resumoj en la angla, la germana kaj la ĉeĥa lingvoj. Ĉar KAEST estas regule aranĝita ĉiun paran jaron, mi jam ĝojatendas la sekvantan, kiu okazos tradicie dum la dua novembra semajnfino 2008.

*Jorma Ahomäki*

***Sube: Gejunuloj distribuas anekdotojn dum konferencaj paŭzoj, interalie plej dekstre Peter Baláz, Slovakio.***



***Pavla Dvoráková prelegas pri multlingvaj vortaroj en la reto, kiuj enhavas Esperanton.***



## Tutmonda Fabelkonkurso por infanoj 2006, rezultoj

**Kategorio A, venis du fabeloj kiuj gajnis dividitan trian premion:**

3. Pri leporo: Jan Bauer, Ĉeĥio

3. Kateto: Jitka Rybkova, Ĉeĥio

**Kategorio B, venis unu fabelo, kiu gajnis la duan premion.**

2. Neĝulo: Denisa Pavlisova, Ĉeĥio

**Kategorio C, venis kvar fabeloj.**

1. Kial havas testudo kirason: Eliska Splichalova, Ĉeĥio

2. Vulpino kaj leporo: Nikola Janouskova, Ĉeĥio

2. Aventuro: Eliska Sidlikova, Ĉeĥio

3. Dorlotita katino: Karolina Silarova, Ĉeĥio

**Kategorio Grupoj, venis kvar fabeloj.**

1. La tri herboj: Gretel Schumann, Francio; Aniko Slezak, Hungario; Alina Calibe Bruegger, Germanio; Aniko Lilla Hegedus, Hungario

2. La fabelo de Anĝela kaj Cedrik: Chaira Coethals, Belgio; Alice Larue, Belgio; Alina Calibe Bruegger, Germanio

3. Historio de jasmeneto: Melissa Morales Sousa, Kubo; Eliany Hernandez Amaya, Kubo; Mainu Garcia Lazaria, Kubo

4. Aventuro el la lando de musoj: Adam Macku, Ĉeĥio; Michal Fukar, Ĉeĥio

La premion Fabelo Internacia gajnis la grupa konkursaĵo La tri herboj. Gratulon por ĉiuj!

*Aini Vääräniemi*

## UEA invitas prelegi en IKU

Dum la 92-a UK en Jokohamo okazos la 60-a sesio de Internacia Kongresa Universitato, kie rajtas lekcii universitataj profesoroj kaj personoj kun simila kvalifiko. UEA invitas tiajn personojn rete aŭ papere prezenti siajn proponojn pri prelegoj al la sekretario de la IKU-komisiono, prof. dr-o Christer Kiselman, <kiselman@math.uu.se>, Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio, plej laste 2007-01-31.

Aparte bonvenaj estos prelegoj rilataj al la kongresa temo, kiu estas "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto". Ĉiu proponinto estos informita pri la decido de la Estraro de UEA plej laste 2007-04-15 kaj, kaze de akcepto, sendu sian tekston al la Centra Oficejo plej laste 2007-05-31. Pliaj detaloj troviĝas en la IKU regularo, rete ĉe [http://uea.org/dokumentoj/iku\\_regularo.html](http://uea.org/dokumentoj/iku_regularo.html)

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## IKU-libro 2006

Krom papere, la kolekto de la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato en Florenco estas nun rete havebla en la retejo de UEA (sub "Dokumentoj") ĉe la adreso <http://www.uea.org/pdf/IKU2006.pdf>. La IKU-libro 2006 estas rekorda laŭ amplekso (154 paĝoj) kaj vendokvanto (124 ekz. dum la UK). Ĝi enhavas naŭ prelegojn kaj enkondukan artikolon pri Esperanto kaj scienco de prof. Amri Wandel. En la retejo troviĝas ankaŭ la prelegaroj de la IKU-sesioj de la jaroj 1998, 2002 kaj 2005. Ĉiuj eldonoj de la IKU-libro ekde la jaro 2000 estas ankoraŭ aĉetebaj en papera formo.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## BET-43

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni vicajn tradiciajn 43-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn.

**Loko:** Nordlitovia Siauliai, urbo de 134000 loĝantoj. BET-43 funkcios en universitato de Siauliai, en ĝia fakultato de sociaj sciencoj (str. Architektu 1). Partoprenantoj povos uzi ĉiujn ejojn kaj servojn de la fakultato (salonoj, aŭditorioj, muzikiloj, komputiloj kun reta aliro).

**Tempo:** La 14-22-an de Julio, 2007. La 21-26-an de Julio 2007 en Kaliningrad (Rusio) okazos la 4-a Balta Esperanto-Forumo. Estas ĉiutaga busveturado inter Siauliai kaj Kaliningrad.

**Aliĝkoto:** Por okcidentanoj: ĝis la 31.12.2006: 60 lidoj, de 01.01.2007 ĝis la 31.03.2007: 75 lidoj, ekde la 01.04.2007: 90 lidoj. Infanoj,

lernantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas. Unu euro egalas al 3,45 lidoj. Aliĝiloj riceveblas ĉe LEA. Pagon ĝiru al konto de Litova Esperanto-Asocio litv-s ĉe UEA. Vidu la finnan peranton sur p. 2.

**Loĝado:** diversnivelaĵoj de plurlitaj ĉambroj en studenta domo aŭ junulara nokto-domo por 15-50 lidoj por nokto por unu persono ĝis hotelaj ĉambroj por 100-250 lidoj por nokto por unu persono. Vidu la Informilon por detaloj. Pagu same kiel aliĝkotizon.

**Programo:** tradicia, i.a. somera universitato, kursoj, artaj aranĝoj, debatoj, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, distraj programeroj, ekskursoj, libroservo, ekspozicioj, gazetara konferenco. Organiza komitato atendas proponojn, ankaŭ sinproponojn.

**Aliaj gravajoj:** Fine de majo 2007 ĉiu aliĝinto ricevos Informilon Nr.2. Aktualaj informoj en retejo de Litova Esperanto-Asocio [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt), informoj pri urbo en [www.siauliai.lt](http://www.siauliai.lt) (bedaurinde nur en litova kaj angla lingvoj), pri universitato en retejo [www.su.lt](http://www.su.lt) (same en litova kaj angla lingvoj).

**Aliĝ-kontaktadreso:** p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Stratadreso de LEA estas: str. L.Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Telefono de LEA estas +370-37-208503 (landa kodo, urba kodo, numero). Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt), [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt).

(el Informilo Nr. 1 redaktis mm)

## UMEA Jubilea Subtenanto

En jaro 2008 UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) festos sian 100-jaran fondiĝdatrevenon. El tiu okazo UMEA invitas kaj petas, ke vi estu Jubilea Subtenanto de UMEA.

La kotizo estas 100 eŭroj. La subtenantoj ricevos la ĵus aperintan pli ol 500-paĝan Esperantan-Anglan Medicinan Terminaron, abonon por nia organo Medicina Internacia Revuo (2007-2008) kaj en jaro 2008 memorinsignon kaj me-

mordiplomon. La Subtenantoj favorpreze rajtos partopreni nian jubilean festan konferencon en Krakovo (Pollando).

Pri la aliĝoj, pagmanieroj, ktp. bonvolu demandi kaj skribi al D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA. HU-9002 Győr, Pf. 143. Hungario, rete: [iferdr@t-online.hu](mailto:iferdr@t-online.hu)

*Kun koraj salutoj: D-ro I.Ferenczy*

## Peto el Tours

Bona novaĵo en Tours! La 5an de oktobro, mi sukcesis starigi Esperantan klubon en mia kolegio. Ĉiuĵaŭde, de la 17a ĝis la 18a horo partoprenas la kurson 6 personoj: 4 gelernantoj kaj 2 geinstruistoj.

Jen mia peto: Por pruvi, ke Esperanto estas vivanta lingvo, mi petas de la tutmonda esperantistaro sendi kuraĝigan poŝtkarton al la suba adreso. Sur tutmondan mapon mi fikso kolorajn pinglojn por signi de kie venas la ricevitaj poŝtkartoj. Ni montros la tuton dum publika tago en marto 2007.

Ĉu vi konsentus fari tion? Ĉu vi povus paroli pri tio al via loka grupo, al viaj korespondantoj?

Jen la adreso: Institution Notre Dame -St Vincent, Club d'Esperanto (D.Baron), 30 rue Delperier, BP 5813, 37058 Tours Cedex 1, Francio

*Amike via, Dominique Baron*

## Apogo al elsendoj de Pola Radio

Post la disvastiĝo de la informo pri ebla ĉesigo de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio jam multaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj skribis al la Pola Radio aŭ al la ambasado de Pollando en sia lando por apogi la daŭrigon de la elsendoj. Nome de UEA prezidanto Renato Corsetti pledis ĉe la pola ministro pri eksterlandaj aferoj kaj ĉe la prezidanto de Pola Radio.

Nun la fina decido pri forigo estas jam farita, sed ekzistas espero ke tamen estos redakcio por interretaj programoj en Esperanto. Gravas daŭrigi la kampanjon al la polaj diplomatiaj repre-

zentejoj tra la mondo, kiuj siavice raportos al la ministerio pri la ricevitaj reagoj. UEA alvokas al individuaj esperantistoj, lokaj kluboj kaj landaj asocioj skribi al la pola ambasado en sia lando por pledante por la daŭrigo de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio. La adresoj de la polaj diplomataj reprezentantoj troviĝas en: <http://www.msz.gov.pl/Polish,Missions,Abroad,2143.html>. Adreso de la ambasadejo en Finnlando estas: Puolan suurlähetystö, Armas Lindgrenin tie 21, 00570 Helsinki.

Esperanto-elsendoj estas aŭskulteblaj en la retaradio-arkivo de Pola Radio ĉe la adreso: <http://www.polskieradio.pl/polonia/audio.asp?rId=11>

*(el komunikoj de UEA redaktis mm)*

## Israelo emisias Esperanto-poŝtmarkon

Post kelkjardecaj klopodoj Esperanto-Ligo en Israelo sukcesis atingi jenan celon: Aperoj de la unua oficiala Esperanta-Zamenhofa poŝtmarko en Israelo.

La emisio okazis la 17-an de decembro en 2006. Sur la marko aperas portreto de L. L. Zamenhof dezajnita en Esperanto-teksto. Samtage ĝi estis stampita per unuataga porokaza stampo, kaj poste aperos memorfolio, kiu surhavas la samajn poŝtmarkon kaj stampon. La Israela Filatela Servo akceptis la peton aperigi poŝtmarkon okaze de la 120-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto kaj la 90-a datreveno de la forpaso de Zamenhof.

*(el eaf-agadas koncizigis mm)*

---

## ✉ Korespondi deziras

58-jara virino, loĝas en urbo Lodzo (Lodz). Intereso: geografio, kolektado de bildkartoj, kulturo kaj tradicioj de aliaj nacioj. Ŝatas bestojn (katojn), florojn kaj legi librojn kaj ilustritajn revuojn. Deziras korespondi por ekzerci la lingvovozon. Jolanta Tyma, ul. Ujście 5, 93-490 Lodz, Pollando/Polska.

## Kiu estis aktiva aganto en 2006?

La estraro de EAF nomumis ĉiujare ekde 2001 aganton de la pasinta jaro. De 2000 Riitta Hämmäläinen, de 2001 Aini Vääräniemi, de 2002 Tapio Sormunen, de 2003 Saliko/Raita Pyhälä, de 2004 Pekka Välimäki kaj Carola Antskog kaj Aganto de la jaro 2005 Patrik Austin.

Kiu laŭ vi meritis la titolon Aganto de la jaro 2006? Bv. kontakti iun de la estraranoj kun via propono antaŭ la sekva estrarkunsido (la 10an de februaro en la oficejo). Neoficiala kontakto sufiĉas, sed kompreneble bonaj motivoj helpos nin fari la ĝustan decidon.

*La estraro*

## Jubilea numero kun historiaj anoncoj

Esperanto-Asocio de Finnlando planas eldoni jubilean numeron de Esperanta Finnlando okaze de sia 100-jariĝo en printempo 2007. La jubilea numero havos pli grandan eldonkvanton.

Ni celas kolekti anoncojn de firmaoj, kiuj jam reklamis en Esperanto antaŭe. Tiaj troveblas krom en malnovaj numeroj, ekz. ankaŭ en la kongresa libro 1922. Ni planas sendi oferton kun kopio de la malnova anonco al ĉiuj elektitaj firmaoj kun oferto pri anoncado. Eblos republiki la malnovan anoncon kun ĝisdatigitaj informoj. La tarifoj estos pli altaj ol kutime por tiu numero. La plej malmultekosta anonco estos listo de gratulantoj.

La laboron kunordigas Carola Antskog, sed ni ankaŭ serĉas helpantojn. Taskoj povas esti helpo pri elekto de anoncoj kaj trovo de aktualaj kontaktinformoj de la firmaoj, skanado de malnovaj anoncoj kaj telefonado al la firmaoj. EAF pretas doni procentaĵon de la enspezoj kiel kompenson por la laboro.

La kontaktinformoj de Carola Antskog troviĝas sub ELFI en la listo de membroasocioj de EAF.

*La estraro*

**Esperanto-Asocio de Finnlando**  
**Suomen Esperantoliitto ry.**

# Vintraj Tagoj

## Talvipäivät

**10.-11.3.2007**

*Kunvenejo: Hotelo Seurahuone Kotka,  
 Keskuskatu 21, 48100 Kotka,  
 tel. 020123464*

### Jubilea jarkunveno en la mara urbo Kotka

La mara urbo Kotka bonvenigas vin por konatiĝi en la urbo kaj kunveni en la jarkunveno de la jubilea jaro. La tagoj komenciĝas sabate per malfermo de la tagoj en la kunvenejo de hotelo Seurahuone. En la programo krom la jarkunveno kaj asociaj kunvenoj estas konatiĝo kun la UK-lando Japanio pere de prelegeto de Saliko (Raita Pyhälä). Ni konatiĝos en la mara urbo vizitante la centron *Maretarium* kaj piedirante en la akvo-parko *Sapokka*. Alia vizito konatigos nin en la ortodoksa preĝejo de la urbo. Unu certe amuza kaj efika programero estos la aŭkcio.

Nin bonvenigas al Kotka aktiva EAF-membro kaj antaŭa prezidanto Synnöve Mynttinen. Venu en la unua aranĝo de la jubilea jaro de EAF!

### Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinko aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson *eafmendoj@esperanto.fi*. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke la organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT.

Ĉar la VT okazos en S-hotelo, ni petas vin ĉifoje mem rezervi ĉambron de la hotelo telefonante al la numero 05-3500401, 0201234666 aŭ sendante retroŝton al la adreso *eija.hernetkoski@sok.fi*. Menciuj ke vi partoprenas aranĝon de Esperanto-Asocio de Finnlando. En

### ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 10.-11.3.2007 en Kotka.

Nomo \_\_\_\_\_

Adreso \_\_\_\_\_

Tel./Fakso/Ret-adreso \_\_\_\_\_

### Aliĝkotizo:

14e ĝis 15.1.2007 \_\_\_\_\_

18e ĝis 28.2.2007 \_\_\_\_\_

21e poste \_\_\_\_\_

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

### VT-paketo 10.-11.3.

inkl. manĝojn (vespermanĝo sabate, lunĉo dimanĉe, kafo) en hotelo Seurahuone en Kotka \_\_\_\_\_ 44 e

Pri tranoktoj bv. legi en la teksto.

**Entute** pagenda al la konto de EAF \_\_\_\_\_

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.  
 Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640** (en la paginformoj nur la referencnumero)

Pliaj informoj aŭ deziroj \_\_\_\_\_

Bonvolu sendi la aliĝilon al:  
 Esperanto-Asocio de Finnlando  
 Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinko

Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

**BONVENON!**

## ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 10.–11.3.2007 Kotkassa.

Nimi \_\_\_\_\_

Osoite \_\_\_\_\_

Puh./faksi/sähköposti \_\_\_\_\_

### Ilmoittautumismaksu:

14 e 15.1.2007 saakka \_\_\_\_\_  
18 e 28.2.2007 saakka \_\_\_\_\_  
21 e 28.2.2007 jälkeen \_\_\_\_\_

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

### VT-paketti 10.-11.3.

sis. ruokailut (illallinen, lounas, kahvi) hotelli Seurahuone Kotkassa.

\_\_\_\_\_ 44 e

Majoitukset ks. teksti.

**Maksut yhteensä** Suomen Esperantoliiton tilille \_\_\_\_\_

Tilinumero: Sampo 800017-230825.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia \_\_\_\_\_

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki tai tiedot sähköpostitse [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

TERVETULOA!

Seurahuone 2-lita ĉambro kostas 79 eŭrojn se vi havas S-karton kaj 88 eŭrojn sen S-karto (normala semajnfina prezo). Tamen indas agi sufiĉe frue ĉar nia rezervo estas ĝis 10.2.2007. Poste vi povas normale rezervi ĉambrojn se restas liberaj en la hotelo.

Viajn eventualajn demandojn pri la urbo Kotka, tranoktejoj, manĝejoj ks. respondos la loka aranĝanto Synnöve Mynttinen, tel. 044-532 8121, [synnove.mynttinen@phnet.fi](mailto:synnove.mynttinen@phnet.fi), pri aliĝoj kaj tranoktado en hotelo Seurahuone vin helpas la EAF-vicprezidanto Päivi Saarinen aŭ al la EAF-sekretario Tiina Oittinen. Pagojn prizorgas la EAF-kasisto Tiina Kosunen. *Bonvenon!*

## Juhlavuoden vuosikokous merellisessä Kotkassa

Merellinen Kotka kutsuu meidät juhluvuoden vuosikokoukseen maaliskuun alussa. Päivät alkavat yhteisellä lounaalla ja päivien avauksella hotelli Seurahuoneen kokoustiloissa. Kotkan kaupungissa tutustumme merikeskus *Maretariumiin* ja vesipuisto *Sapokkaan* sekä vierailemme ortodoksisessa kirkossa. EAF:n vuosikokouksen ja muiden yhdistyskokousten lisäksi ohjelmassa on Raita Pyhälän esitys Japanista: Saliko valmistelee meitä kongressiin kertomalla japanilaisista tavoista ja kulttuurieroista. Lisäksi luvassa on aina hauska ja yllätyksellinen huutokauppa.

Kotkaan meidät toivottaa tervetulleiksi EAF:n aktiivinen jäsen ja yhdistyksen entinen puheenjohtaja Synnöve Mynttinen. Tule mukaan juhluvuoden ensimmäiseen tilaisuuteen!

## Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi). Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvit-





*Mara centro Maretarium en Kotka estas unu el la ekskurslokoj dum la Tagoj.*

semme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut.

Tällä kertaa talvipäivien tapahtumapaikkana on Kotkan Seurahuone, joka on S-ryhmän hotelli, ja pyydämmekin talvipäivien osallistujia varaamaan itse huoneen hotellista joko puhelinnumeroista 05-3500401 ja 0201234666 tai sähköpostitse osoitteesta [eija.hernetkoski@sok.fi](mailto:eija.hernetkoski@sok.fi). Varatessasi mainitse, että olet tulossa Esperantoliiton tapahtumaan. Hotellissa 2 hengen huoneen hinta on 79 euroa (jos omistat S-etukortin) tai 88 euroa (hotellin viikonloppuhinta). Mutta kannattaa toimia ajoissa, sillä huonekiintiö on voimassa 10.2.2007 saakka ja sen jälkeen varaukset voi tehdä normaaliin tapaan, jos vapaita huoneita riittää.

Kotkan kaupunkia, majoitusmahdollisuuksia ym. koskevia asioita voit tiedustella paikalliselta yhteyshenkilöltä Synnöve Mynttiseltä, puh: 044-5328121, [synnove.mynttinen@phnet.fi](mailto:synnove.mynttinen@phnet.fi). Ilmoittautumisessa ja majoittumisessa hotelli Seurahuoneelle saat apua liiton varapuheenjo-

tajalta Päivi Saariselta tai liiton sihteeriltä Tiina Oittiselta. Maksuista huolehtii liiton rahastonhoitaja Tiina Kosunen. *Tervetuloa!*

## Subtena societo de EAF

Samtempe kun la kotizo al VT – aŭ kiel aparta pago – vi estas tre bonvena aliĝi al la subtena Societo Nino Runeberg por 36 eŭroj.

La anoj de la societo ricevos dum la jaro krom akcepton dum VT ankaŭ specialan renkonton dum la jubilea tago kaj aliajn etajn surprizojn.

*Anna Ritamäki, prezidanto*

Esperantoliiton kannatusseura Societo Nino Runebergin jäsenmaksu on 36 euroa.

Esperantoförbundets understödssällskap Societo Nino Runeberg har medlemsavgift 36 euro.

## Estraro kunvenis

La estraro kunvenis kadre de la AKK-projekto (estrara kunsido 8/2006) 28.10.2006 je 11.25-15.45 en la oficejo kaj poste dum komuna manĝo. Ĉeestis AR, TO, TG, PS, MS, TH, TP.

Jubilea skatolo por gratuli la 100-jaran asocion estis lanĉita en la festo de Esperanto-Klubo de Helsinko (EKH) la 10an de oktobro 2006. La sekretario kunordigas.

EAF gratulis en la EKH-festo per karto kun foto de Nino Runeberg kaj donaco de unu senpaga partopreno en nia jubilea festo kaj vespera bankedo en la Nobelara domo sabaton la 28an de aprilo 2007 al EKH, la posteulo de Polustelo, inicianto de EAF.

La estraro diskutis pri la jubilea tago en Helsinko 28.4.2007. La laborgrupo por kvizpromenado estas Carola Antskog, Aila Havia kaj Taneli Huuskonen. Ankoraŭ ne ekzistis ofertoj pri la servado dum la tago (bonveniga tosto, kafo kaj festa kuko) kaj la vespera bankedo.

Pri la festivalo Arta Lumo en Kuopio 27.7.-1.8.2007 la estraro decidis rajtigi la laborgrupon AR, PS kaj TO plutrakti kun la loka turista servo Kuopion Matkailupalvelu kaj subskribi kontrakton kun ĝi pri prizorgo de tranoktejoj mendoj kaj aliĝoadministrado. [Poste montriĝis ke la kontrakto ne sekvis niajn intertraktojn, ankoraŭ poste ke la servo pro la samtempa okazigo de Farmari-foiro tamen ne pretas prizorgi nian eventon. Ni tamen sukcesis rezervi sufiĉajn ĉambrojn helpe de alia firmao Lakeland Experts. Ni rezervis du proksimajn lernejojn kiel amasloĝejojn.]

La estraro decidis ke la preparoj de lingvopolitika simpozio en la aŭtuno povos daŭri surbaze de la jenaj ideoj: Bona loko estas Vaasa-Vasa, kiu estas dulingva, universitata urbo kaj situas en alia parto de la lando kompare al niaj du aliaj ĉefaj jubileaj okazejoj (Helsinko, Kuopio). La temoj povus esti plurlingva administrado (de urboj, lernejoj, organizaĵoj, ŝtataj kaj privataj) kaj similaĵoj inter la finna kaj Espe-

ranto. Aŭtunaj Tagoj povas okazi samloke, estus elekteblaj programeroj, ankaŭ iuj pli turismaj.

Pri subvencipetoj al Suomen Kulttuurirahasto (limdato 31.10.2006): EAF preparis petojn por festivalo Arta Lumo kaj por Lingvopolitika simpozio kaj rekomendleterojn por tri pliaj petoj, EAF-historio (C. Antskog), vortara laboro (Mira Anonen) kaj fabelarto & ekspozicio (M. Sarastamo). Terttu Österman rahasto ne disdonas ĉi-jare, sed oficisto de la fondaĵo rakontis ke la decidoj estas faritaj surbaze de trakto en fakulaj grupoj, ne surbaze de la reguloj de la fondaĵoj kaj ke ĉiam indas ensendi bonkvalitajn petojn. EAF tamen mencias la ekziston de la Terttu Österman-fondaĵo kiel argumenton en siaj rekomendaj leteroj.

Petoj por diversaj aranĝoj dum la jubilea jaro estas preparataj ankaŭ al Fondumo Esperanto, edukministerio, Svenska kulturfonden (limdato 30.11.2006), Esperantic Studies Foundation kaj al la urboj, kie okazas niaj jubileaj eventoj.

La estraro decidis formale ke EAF organizos oficialan jubilean monokolekton kaj ke ĝia celo estas subteni Esperanto-kulturon en Finnlando. La kolekton EAF realigos per rektaj donacoj al aparta kolektokonto kaj, por ebligi donacojn ekz. dum renkontiĝoj, pere de 30 kolektuoj, pri kies distribuo kaj sekvo respondecos la vicprezidanto. La monokolekto komenciĝas je akcepto de la kolektopermeso kaj daŭros ĝis la fino de 2007.

Synnöve Mynttinen invitis Vintrajn Tagojn al Kotka 10.-11.3.2007. La estraro akceptis la datojn kaj decidis pri kotizoj.

EAF gratulis la vicprezidanton kaj ĉefdelegiton Päivi Saarinen somere pro ŝia 50-jariĝo kaj donacis al ŝi la asocian standardon.

Jukka Pietiläinen tradukis en la finnan la rezolucion de la pasintsomera UK en Florenco.

Stano Marček el Slovakio sendis al EAF sian novan lernolibron *Esperanto per rekta metodo*. Laŭ lia oferto eblas fari propralingvan version favorkoste.

## Jubilea skatolo cirkulas

La jubilea skatolo de EAF, kiu invitas finnlandajn esperantistojn al la nobelara domo 28.4.2006, komencis sian cirkulantan vojaĝon en Helsinko en la festo de EKH la 10.10.2006.

El Helsinko la skatolo vojaĝis al Salo, kie ĝi estis akceptita la 29.10.2006 en salono de Lauri de la urba biblioteko. La aranĝo estis malferma ankaŭ al la publiko. Ĉeestis deko de festantoj. La gazetara komuniko rezultigis kelkajn arti-

kolojn en lokaj amaskomunikiloj, legu pli en la artikolo *Muut lehdet*.

La 1.11.2006 la skatolo alvenis al Turku portita de la prezidanto de Salo kaj estis solene antaŭendonita al Esperanto-societo en Turku. Dum la akcepto en la malnova urbodomo la societo regalis per verdaj kuketoj kaj verda trinkaĵo, kiujn faris Mari Vaalto. La prezidanto Tiina Oittinen prezentis la kontribuon de Turku en ▷



**Prezidanto Eero Saari (dekstre) kaj vicprezidanto Carola Antskog el Esperanto-klubo de Salo donis la skatolon al Turku-kluba prezidanto Tiina Oittinen (live) kaj sekretario Leena Tiusanen.**

▷ Leif Nordenstorm donacis al la biblioteko de EAF siajn verkojn, i.a. *Arne, la ĉefido*.

Pentti Järvinen de E-societo Antaŭen, Tampere estis intervjuita en radioprogramo *Aristoteleen kantapää* de Radio Yle 1. Li nome de EAF donacas al Yleisradio unu DVD:n *Esperanto Elektronike*.

Markku Sarastamo el Hämeenlinna informis pri plano fondi novan Esperantosocieton en Hämeenlinna-regiono.

La estraro decidis pri du sekvaj kunsidoj: sabate 2.12.2006 kaj sabate 10.2.2007 je la 11a h en la oficejo en Helsinko.

la skatolon, inter alio turismajn prospektojn pri Turku, deklaron de la kristnaska paco kaj poemon, kiu estas gravurita en muzeo de Wäinö Aaltonen. En la programo estis ankaŭ muzikaĵoj prezentitaj de EST-membroj kaj festparolo de Tuomo Grundström, EST-membro el Raŭmo, interalie pri lia unua vizito al kunveno de EST en aĝo de 15 jaroj.

Ĉe-estis entute 18 personoj, inter ili dana amiko de Tuomo. La etoso de la aranĝo estis samtempe solena kaj amuza. En Turun Sanomat estis mencioj pri la aranĝo en Kie iri? -kolumno kaj en asocia-paĝo. Krome EST-prezidanto Tiina Oittinen estis intervjuita de loka radiostacio Radio Majakka.

La sekva akcepto de skatolo estis en Hämeenlinna, kie aktiva esperantista grupo planas en januaro fondi novan asocion. La skatolon portis el Turku al Hämeenlinna EST-prezidanto Tiina Oittinen kaj ŝi estis malfermita dum la jula festeto de Hämeenlinna-anoj 27.11.2006.

El Hämeenlinna la skatolo pluiris al Tampere 11.12.2006 kaj sekve iros al Jyväskylä 10.1.



*Esperantece ornamitaj kuketoj...*



2007. Poste sekvos Oulu kun Metsäkylä kaj Iisalmi. Antaŭ la Vintraj Tagoj la skatolo tre verŝajne jam vizitis ankaŭ la urbojn Kuopio, Lappeenranta kaj Lahti. La skatolo kun sia multflanka enhavo, i.a. kun la libro kun gratuloj al la jubila EAF, estos solene donita al la Asocio en Nobelara domo 28.4.2007.

*Tiina Oittinen /  
Mikko Mäkitalo*

*...estis faritaj de Mari Vaalto.*

## Slovaka solvo por lernolibra manko?

Ĝuste kiam oni agnoskis, ke Finnlando bezonas novan lernolibron de Esperanto, venas propono de Slovakio traduki la novan verkon *Esperanto priamou metódou* (Esperanto per rekta metodo) de Stano Marček. Ĉi momente EAF uzas la svedan lernolibron *Egaleco kaj paco per Esperanto* de Lars Forsman, tradukita de Raita Pyhälä.



Kvankam la libro de Marček estas nigra-blanka, kun ilustrado de Linda Marčeková ĝi aspektas moderna. Marček tre efike uzas bildojn por vidigi la signifon de enkondukataj vortoj. La bildoj estas simpligitaj, tamen bonaspektaj. La plej multaj aperas en filmbenda marĝeno, kiu pluas tra la tuta libro. La grafika kunmeto iom pezas kun multaj elementoj sur unu paĝo. Gramatiko progresas rapide: ĉu-demandoj aperas jam en la dua

leciono. Tio povas rezulti el influo de la slovaka lingvo, kiu havas similan demandvorton *ĉi*.

## Tiedotteesta telkkariin, otsikosta eetteriin

*Esperantoliiton koulutus-päivään 14.10.2006 osallistui kahdeksan, tässä Mira Anonen, Tiina Oittinen, Sylvia Hämäläinen ja Raita Pyhälä. Esimerkkinä tutustuttiin Lukirock-tapahtuman tiedotuskampanjaan. Tiedotteiden lisäksi tarvitaan esitteitä, T-paitoja ja muita tuotteita. EsperHe järjesti päivälle hyvät puitteet.*

*Kuvat: Anna Ritamäki*



◁ *Katja Nuorvala muistutti, että radiossakin kannattaa hymyillä. Lisäksi kannattaa huomioida tiedottaessa, että tiedotusvälineet profiloituvat. Eri aiheet vetoavat eri kohderyhmiin.*

▷ *Riitta Hämäläinen oli koonnut koulutukseen osallistujille esimerkkejä tiedotteista ja niiden tuloksista. Tässä hän kertoo viime vuoden Esperantofestareiden tiedotuksesta.*



- ▷ Ankaŭ prepozicioj venas rapide, sed sufiksoj nur poste: en la oka leciono estas rakonto pri *malgranda* knabo – ĉu ne knabeto?

*Esperanto priamou metódou* estas celata por lecionoj kun parolo ĉefe en Esperanto, kio estas pluso por kursgvidantoj. En Finnlando tamen signifa parto de la proksimume 100 homoj jare, kiuj aĉetas esperantan lernolibron, celas ĝin por memstudado. En ĉi tiu alternativo estas nemultaj ekzercoj: plej ofte lego- aŭ parolekzercoj aŭ kopiado de tekstetoj. La lasta estas lernostrategio, kiun oni oficiale ne plu uzis en nia lando post

la 60-aj jaroj. Mi serĉis korektajn respondojn por la ekzercoj en la fino de la libro, sed anstataŭe trovis la indekson tie.

La ĉapitroj ĉefe reprezentas informan aŭ rakontan tekstotipon anstataŭ komuniko. Kun tiaj tekstoj kaj sen konstruaj ekzercoj la libro funkcias pli prave kiel facila krestomatia, kun la diferenco, ke tekstoj de vera krestomatia verŝajne estus pli interes-vekaj. Se oni fine komparas Marĉek kun Forsman, ambaŭ havas avantaĝojn: Marĉek taŭgas por lecionoj, Forsman por memstudado. Ni bezonus du en unu.

*Patrik Austin*

## Arta Lumo – plej favore en januaro

La estraro fiksas la bazajn kotizojn de la festivalo Arta Lumo en sia kunsido la 2an de decembro. Ni volas oferti al ĉiuj legantoj de Esperanta Finnlando la ŝancon utiligi la rabaton por rapidaj aliĝantoj. La unua aliĝperiodo finiĝas fine de marto ĝis kiu la kotizo estas 110 eŭroj – sed ĝis la fino de januaro validas speciala oferto: 99 eŭroj!

Pli precizaj informoj aperos en informilo kun aliĝilo, kiun ni publikigos rete ĉe *www.esperanto.fi*, distribuos al niaj memrosocietoj en januaro kaj per Esperanta Finnlando en februaro. Aktualajn informojn ni ankaŭ dissendos perpoŝte kaj retpoŝte al petintoj, ankaŭ ĉiam al EAF-agadas, retlista servo por membroj. Eblas mendi la aliĝilon de la oficeja adreso aŭ de *ArtaLumo@esperanto.fi*.

Al demandoj respondas la Arta Lumo-teamo Anna Ritamäki (programo), Päivi Saarinen (loĝado) kaj Tiina Oittinen (ĝeneralaj aferoj kaj ekskursoj).

### Arta Lumo – kio?

Festivalo de esperantlingva arto – literaturo, muziko, teatro, pentroarto, danco, kino, kreemo plej varie.

### Arta Lumo – kiam?

27 julio – 1 aŭgusto 2007.

### Arta Lumo – kie?

En Muzikcentro de Kuopio, koncertejo impona en ĉarma ĉelaga urbo en la lando de la centjariĝanta Esperanto-Asocio de Finnlando

### Arta Lumo – por kiu?

Por kulturĝuantoj de la tuta mondo, esperantistoj kaj esperantolernantoj. Pluraj programeroj malfermaj al la loka loĝantaro.

### Arta Lumo – kiomkoste?

– ĝis 30.3.2007: A-landoj 110 e, B-landoj 90 e

## Ejo de Arta Lumo

**Muzikcentro de Kuopio**, konstruita en 1985, apartenas al la landa elito de koncert- kaj kongresejoj kun ĉiujare pli ol 300 aranĝoj kaj 100 000–150 000 vizitantoj. La centro estas la hejmo de la Simfonia Orkestro de Kuopio kaj lernejo de estontaj muzik- kaj dancartaj profesiuloj.

La ĉefa koncertejo havas 1064 sidlokojn. La salono estas adaptebla por variaj spektakloj kaj diversgrandaj publikoj. Diversetosaj ĉambroj ebligas vastan varion en la arta oferto. En la kelo situas ĵazklubejo enirebla de aparta enirejo. La koron de la muzikcentro formas la 11,4 metrojn alta lumhalo kiu trairas ĉiujn kvar superterajn etaĝojn. La lum-



hala scenejo estas aparte konvena por dancaj spektakloj. Lige al ĝi situas ankaŭ kafejo-restoracio.

- rabatita kotizo por rapidaj aliĝantoj ĝis fino de januaro: 99 e/79 e
- ĝis 30.6.2007: A-landoj 135 e, B-landoj 115 e; poste 150 e por ĉiuj
- taga kotizo 40 e (sabate-marde)
- por koncertoj estos haveblaj apartaj biletoj

A- kaj B-landoj difinitaj laŭ la kongresa aliĝilo de UEA.

La kotizo enhavas la programon kaj lunde ekskurson al fumsaŭno. La ekskurso enhavos krom saŭnumadon kaj naĝadon vespermanĝeton kaj kunestadon ĉe bivakfajro kun kantoj kaj ludoj.

Perataj tranoktaj alternativoj de luksaj hotel-ĉambroj ĝis amasloĝejo en proksima lernejo.

Pagoj al kontonumero de Festivalo Arta Lumo 800010-71256003. Por eksterlandaj pagoj haveblas la necesaj bankkodoj. Pagalternativoj al uea-konto kaj, en pluraj landoj, al peranto.

*Ekflamu la Arta Lumo!*

*Esperanto-Asocio de Finnlando*

## Eventokalendaro de EAF

### Jubilea jaro 2007

- 10–11.3.2007 Vintraj Tagoj de EAF, Kotka  
 28.4.2007 Jubilea tago, Helsinko: urba programo, jubilea festo, jubilea bankedo  
 23–27.7.2007 Esperantokursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)  
 26–27.7.2007 Antaŭekskurso de monaĥejo ĝis Kuopio  
 27.7–1.8.2007 Festivalo Arta Lumo, Kuopio  
 27.7–3.8.2007 Internacia Junulara Kongreso, Hanojo, Vjetnamio (TEJO)  
 4–11.8.2007 Universala Kongreso, Jokohamo, Japanio (UEA)  
 oktobro 2007 Simpozio “Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike”, Vaasa–Vasa  
 15.12.2007 Malferma tago en la oficejo, Helsinko

## Renato Corsetti al Finnlando

La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Renato Corsetti venos de Italujo al nia jubilea festo. Li pretas jam semajnon antaŭe prelegi ekzemple en universitatoj. Lia vizito estas ero en nia tema programo “Pluraj lingvoj praktike”, kiu kulminos per simpozio en oktobro. Renato Corsetti havas vastan kompetenton prezenti interesajn temojn al diversaj publikoj. Estas ankoraŭ multe da spaco en lia Finnlanda horaro. Se vi havas proponojn bv. kontakti la prezidanton de EAF Anna Ritamäki.

Renato Corsetti, naskiĝis la 29-an de marto 1941-a, studis komence ekonomion kaj poste lingvistikon, laboris dum la unua parto de la vivo kiel direktoro pri organizado en banko kaj dum la dua parto ĝis nun kiel profesoro pri psiĥolingvistiko. Verkis librojn unue pri la itala banka mondo kaj poste pri psiĥolingvistiko kaj instruado de lingvoj.

Li interesiĝis pri Esperanto kaj lingva politiko fine de la 60-aj jaroj. De tiam li estis aktiva en pluraj niveloj de Esperanto-organizaĵoj, honora prezidanto de TEJO kaj nuna prezidanto de UEA, verkis ĉefe labor-instigajn artikolojn en multaj Esperanto-revuoj, patras denaskajn esperantistojn.



### Maailmanliiton puheenjohtaja Suomeen

Esperanton maailmanliiton puheenjohtaja, italialainen Renato Corsetti vierailee Suomessa Suomen Esperantoliiton satavuotisjuhlassa ja on halukas tulemaan jo viikkoa aiemmin luennoimaan esimerkiksi yliopistoissa. Hänen vierailunsa liittyy juhluvuoden teemaan “Monikielisyys käytännössä”, jonka huipentumana järjestetään lokakuussa symposio. Renato Corsetti voi ▷

laajan tietämyksensä ansiosta luennoida hyvin erilaisia kohderyhmiä kiinnostavista aiheista. Hänen Suomen-aikataulussaan on vielä runsaasti tilaa. Ehdotuksia voi lähettää Suomen Esperantoliiton hallituksen puheenjohtajalle Anna Ritamäelle.

Renato Corsetti, s. 29.3.1941, opiskeli ensin taloustiedettä, myöhemmin kielitiedettä. Hän työskenteli nuorempana pankin hallintojohtajana ja siirtyi sitten nykyiseen työhönsä psykolingvistiikan professorina. Hän on kirjoittanut kirjoja Italian pankkimaailmasta sekä psykolingvistiikasta ja kielenopetuksesta.

Corsetti kiinnostui esperantosta ja kielipoliitikasta 1960-luvun lopulla. Siitä lähtien hän on toiminut aktiivisesti monin tavoin erilaisissa esperantojärjestöissä. Hän on Maailman nuorten esperantoliiton kunniapuheenjohtaja ja Esperanton maailmanliiton puheenjohtaja. Hän kirjoittaa innostavia artikkeleita moniin esperantolehtiin. Hänen lapsensa puhuvat esperantoa yhtenä äidinkielenään.



### **Internationella esperantoförbundets ordförande till Finland**

Internationella esperantoförbundets ordförande Renato Corsetti från Italien kommer till Finland för att delta i vår 100-årsjubileumsfest den 28 april 2007 i Helsingfors. Han är beredd att komma en vecka tidigare för att föreläsa t.ex. på universitet som ett led i vår temahelhet "Flerspråkighet i praktiken" som kommer att kulminera i ett symposium i oktober. Renato Corsetti har en bred kompetens och kan lyfta fram intressanta ämnen för varierande publik. Det finns ännu rum för fler åtaganden under Finlandsbesöket. Om du har ett förslag ta kontakt med Anna Ritamäki, Esperantoförbundets ordförande.



Renato Corsetti, f. 29.3.1941, studerade först ekonomi, senare lingvistik. Under den första delen av sitt liv arbetade han som organisationsdirektör för en bank och under den andra delen fram till nu som professor i psykolingvistik. Han har skrivit böcker, först om italienska bankvärlden, sedan om psykolingvistik och språkundervisning.

Hans intresse för esperanto och språkpolitik väcktes i slutet av 60-talet och har sedan dess varit aktiv på flera nivåer i esperantoorganisationer. Han är hedersordförande i internationella esperantoundomskförbundet TEJO, ordförande i internationella esperantoförbundet UEA, författare till många uppmuntrande texter i esperantotidskrifter och far till barn som lärt sig esperanto som ett av sina modersmål.



## Nova ĉefdelegito sin prezentas

Saluton!

Mi estas Päivi Saarinen, ĉefdelegito en Finnlando ekde printempo. Multaj el vi bone konas min, multaj ricevis leterojn de mi, sed eble ne ĉiuj scias kiu mi estas. Tial la redaktaro de Esperantolehti petis min skribi kelkajn vortojn.

Dum mia vivo mi loĝis en tri regionoj: mi naskiĝis en Kotka, vizitis lernejon en Helsinko, studis kaj laboris en Turku, kaj nun mi loĝas en Espoo ekde dek jaroj. Mi havas edzon Antti kaj filinon Aura, el kiuj Antti estas esperantisto kaj Aura ne ankoraŭ lernis la lingvon. Ili ambaŭ vojaĝas kune kun mi al esperantaj renkontiĝoj.

Mi estas diplomita tradukisto laŭ profesio sed laboris multajn jarojn kiel sekretario. Mi renkontis mian bonan amikino Tiina (Oittinen) kiam mi studis en la lingva instituto de Turku kaj kune ni decidis partopreni kurson de esperanto en la laborista instituto aŭtune 1983. Nia instruistino estis Leena Tiusanen, fama esperantisto kaj ĉiĉerono en Turku. Post la kurso Tiina kaj mi partoprenis Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Swanwick, Britio, kie ni vidis ke esperanto vere estis uzata dum la tuta aranĝo. Sen ĉi tiu sperto eblas ke ni ne restus en la movado. Do, laŭ propra sperto, mi taksas tre grave kaj ke ni ofertas kursojn kaj ke ni donas eblecojn uzi la lingvon kaj utiligi la lingvoscion: renkontiĝojn, gazetojn, vizitantojn ktp.

Post la elementa kurso kaj la IJK en Swanwick mi havis diversajn taskojn en Esperantujo. Dum la jaroj mi estis estrarano en Turku kaj en EAF, ofte kun iu alia tasko kiel sekretario aŭ kiel nun vicprezidanto, kaj mi eĉ estis prezidanto en Turku dum kelkaj jaroj. Mi partoprenis diversajn esperantorenkontiĝojn, ekz. Universalajn kongresojn de UEA kaj Kulturajn Esperanto-



Festivalojn (KEF). Dum la Vintraj kaj Aŭtunaj tagoj de EAF vi povas ofte vidi min ĉe mia migranta librovendejo.

Ĝenerale mia intereso estas en praktikaj laboroj. Por servi la membraron, mi deĵoras en la oficejo de EAF, sendas librojn al mendintoj kaj traktas aliĝojn al niaj aranĝoj. Kvankam ĉi tiuj laboroj iamaniere daŭros ĝis-eterne, mi povas dumvoje vidi

ankaŭ pretajn laborojn kaj eĉ rezultojn. Ĝuste nun mi sentas plej grave miaparte certigi ke la granda 100-jara jubilea jaro de EAF bone sukcesos kaj donos al nia finnlanda movado firman bazon por la sekva jarcento. Ĉiu el ni laboras laŭ propra gusto kaj ĉies laboro gravas, mi mem tamen kredas je unueco laŭ grupa agado. Ni estu multaj por esti fortaj!

*Varmajn salutojn,  
Päivi*

### **Kelkaj aferoj rilate al UEA:**

Se UEA scias vian retroŝtan adreson, la centra oficejo sendas retan konfirmon pri pagita membrokoto. Same estas konfirmitaj ankaŭ aliĝoj al UK kaj diversaj mendoj. Mi kiel ĉefdelegito ankaŭ ŝatus havi vian retadreson, kaj volonte peros ĝin ankaŭ al UEA.

La jaro 2007 estos elektojaro kaj UEA sendos al siaj membroj balotilojn por elekto de B-komitatoj en aprilo. Samtempe ili sendos ankaŭ novajn membrokartojn al la membroj kiuj ankoraŭ ne ricevis ilin.

La subtenaj kategorioj Societo Zamenhof kaj Patronoj de TEJO bonvenigas pliajn subtenantojn. Viaj subtenoj ankaŭ helpas la specialajn fondaĵojn de UEA, kiuj financas multajn agadojn sed ofte havas malmultajn aŭ neniujn aliajn enspezojn ol donacoj. Gravaj estas ekzemple ▷

Fondaĵo Canuto, kiu membrigas ne-pagipovajn aktivajn esperantistojn en UEA, kaj la Volontula Fondaĵo, kiu ebligas inviti volontulojn por helpi en la Centra Oficejo. La priskriboj de ĉiuj fondaĵoj estas en la Jarlibro 2006, p. 34-35.

## Membrokotizoj de UEA en 2007

MG-membro 9 eŭroj (gvidlibro)

MJ-membro, MJ-T-membro 23 eŭroj (jarlibro)

MA-membro, MA-T-membro 57 eŭroj (jarlibro + revuo *Esperanto*)

Dumvivaj kotizoj:

DM-membro, DM-T-membro 1425 eŭroj = 25 x MA (jarlibro + *Esperanto*)

DMJ-membro, DMJ-T-membro 575 eŭroj = 25 x MJ (jarlibro)

La kotizoj estas la samaj ankaŭ por junaj membroj (naskiĝintaj post 1.1.1977, bv. memori informi naskiĝdaton). La kotizoj por junaj membroj (-T) inkluzivas membrecon en TEJO kaj abonon de *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*.

**Subtenaj membrokotizoj** krom la supra membrokotizo por subteni la agadon:

*Societo Zamenhof* 114 eŭroj

*Patronoj de TEJO* 69 eŭroj (inkl. *Kontakto* ja

*TEJO tutmonde*)

La abonoj de la **periodaĵoj de UEA** sen membreco estas sekve: *Esperanto* 36 eŭroj, *Kontakto* 22 eŭroj, *TEJO tutmonde* 12 eŭroj.

EAF peras ankaŭ aliajn gazetojn. Jen ekzemploj pri prezoj:

*Monato* (11 numeroj) + *La Jaro* (kalendaro por la jaro 2007): 46 eŭroj (aerpoŝta aldono 4 eŭroj), reta gazeto 27,60 eŭroj, *La Jaro* 5 eŭroj (tuja sendo + 4 eŭroj).

*La Ondo de Esperanto* (11 numeroj): 32 eŭroj (aerpoŝta aldono 5 eŭroj); novaĵo: elektronika abono (pdf) 12 eŭroj.

Demandu ankaŭ pri **aliaj gazetoj!** Krome ni peras ankaŭ viajn **libromendojn** kaj **ĝirojn al viaj UEA-kontoj**.

La 92-a **Universala Kongreso** okazos 4.-11.8.2007 en Jokohamo, Japanio. La unua aliĝperiodo estas ĝis la jarŝanĝo, kiam la kotizoj altiĝos. Se vi ne havas aliĝilon, bv. peti de la oficejo. Eblas aliĝi ankaŭ per retpaĝoj de UEA en adreso <http://www.uea.org>. Kaj antaŭ la UK al Festivalo **Arta Lumo** en Kuopio 27.7.-1.8.2007!

Ni en Esperanto-Asocio de Finnlando volonte aŭdos viajn dezirojn, respondos viajn demandojn kaj disponeblas pri Esperanto-aferoj.



*La leporeto komencis paroli homan lingvon per fea-gnoma voĉo.*



*La Grafino kaj la Timida Kavaliro.*

## Eksterordinara libro por infanoj ĉiuaĝaj

*Ni trovis eksterlandan familion por recenzi la libron La Grafino kaj ŝia fantasta vivo per helpo de Jouko Lindstedt, kiu plusendis nian alvokon al la retlisto Denask-L. En la familio de Mari-Helen Desert en Francio estas tri infanoj, interalie 9-jara knabino Klara, kiu scipovas legi en Esperanto, sed tre ŝatas ke oni legu por ŝi.*

Kun miro mi ricevis la libron *La Grafino kaj ŝia fantasta vivo* de Markku-Tapio Sarastamo, en ĝia finna versio kun majstra traduko en Esperanto de "Saliko" Raita Pyhälä. Jen ne ordinara libro. Se temas pri libroj en Esperanto, mi ĝenerale opinias, ke al infanoj oni komence legu prefere facilajn tekstojn por instigi ilin al komprenemo. Kiam mi eklegis al la filino, mi timis ke ŝi rapide senkuraĝiĝos kaj forlasos la aferon, ĉar la vortrezoro estas grandparte nekonata al ŝi. Sed okazis tute male: ŝi sekvis la rakonton kun granda intereso, kaj kiam venis la momento enlitiĝi, ŝi eltiris la promeson ke ĉiuokaze ni legos al ŝi venontvespere.

Unue mi ofte interrompis la legadon por klarigi diversajn malfacilajn vortojn. Verdire ĉi lastaj abundas, almenaŭ laŭ plenkreskula vidpunkto. Sed la filino pli kaj pli instigis min lasi tion, por ne perdi la fadenon de la rakonto. Ŝi pravas: gravas ankaŭ la muziko, la ritmo de la frazo, gravas la ĉefaj elementoj, kaj la signifo de la cetero klariĝas iom post iom.

La rakonto ne estas ordinara: Ne ofte feino transformas al plenkreskulo infanon laŭ ties deziro. Ne ofte la novbakita plenkreskulo volontas lasas sian infanaĝon senbadaŭre. Ne ofte en rakonto, feliĉo venas de fantaziaj ĉiutagaĵoj, saĝaj toleremaj decidoj en ekologia ekvilibro, ordinaraĵoj en riparenda kastelo kun timida kirasita kavaliro kaj tuta liliputaro. Markku-Tapio Sarastamo verkas por infanoj ĉiuaĝaj kaj tiel rompas stereotipojn de porinfana literaturo. Ŝajnas ke ĝuste tiu karakterizo vekis apartan intereson ĉe la filino.

Fine, jen vorto pri la aparte belaj ilustraĵoj: per ne malpli ol 28 tutaĝaj bildoj, la aŭtoro mem tre detale pentris kun videbla deziro ne obei al nuntempa estetiko de infanlibroj, sed lasi brilajn kolorojn kaj artan fantazion prilumi la libron per naiva stilo. Ĉiu bildo indas por ornamo ankaŭ la murojn de gaja ĉambro. Oni tuj kaptiĝas de tia magio, kaj sentas sin kvazaŭ la feino ankaŭ redonis al oni ties mirkapablon antaŭ la belo.

Konklude, oni ne hezitu donaci tiun libron, kaj oni prenu tempon por legi kune. Verdire, por tiaj pantoflaj momentoj la jarfinaj ferioj tute konvenas, sed mi ne dubas ke la libro ankaŭ plaĉos en ĉiuj sezonoj ...

MH D

Mari-Helen Desert



*La Flarsuloj kaj Kisruloj aspektas iom kiel ordinaraĵoj gnomoj.*



*La hejmratoj havas sekreton.*

## Kertomuksia Oulusta ja Salosta

Haukiputaalla järjestetyt Suomen Esperantoliiton syyspäivät saivat tilaa Oulun seudun paikallislehdissä: Puttaalainen (20.9.), Juoksupoika (5.10.), Oulu kaupunkilehti, (14.9.), Rantapohja-lehti (21.9.), Haukiputaan kunnan tiedotuslehti Tilitori (12.9.), Forum 24 -lehti, (14.9.) sekä pohjoispohjalaisessa ja lappilaisessa Kansan Tahto -lehdessä (7.9.). Kesä Kaleva 2006 -lehden sivuilla esiteltiin Oulun läänin yhtenä kesäisenä käyntikohteena Metsäkylän esperanto-keskus Taivalkoskella.

Forum 24, Puttaalainen ja Juoksupoika haastattelivat Haukiputaalla asuvaa Oulun Esperantoseuran puheenjohtajaa Erkki Röntystä esperanton käytöstä ja EAF:n syyspäivistä.

Röntysten perheessä Erkki oppi kielen jo pöikäsena, unohti sen välillä ja aloitti esperanton käytön myöhemmin uudelleen. Aira opetteli kielen 1990-luvun alussa.

Oulun esperantistit kokoontuvat lauantaisin keskustelemaan kaupungin pääkirjastossa. Oulussa on ollut esperanto-toimintaa 1920-luvulta lähtien, vaikka Oulun kerho perustettiin vasta 1978.

Erkki kertoi, että nykyisin yhteydenpito maailman esperantistien kesken on vilkastunut ja helpottunut internetin ansiosta, kun mm. Skype-verkkopuheluilla voi ottaa vaivattomasti yhteyttä muihin esperantisteihin ympäri maailmaa. Kielitaito pysyy yllä puhumalla, ja Erkki Röntynen on löytänyt keskustelukumppaneita Japanista, Vietnamista, Marokosta ja Brasiliasta. Internetistä löytyy myös hyvin tietoa kielestä.

Yli sata vuotta sitten keksityllä kielellä on kirjoitettu kirjoja, lehtiä ja runoutta. Esperantonkielisiä kirjoja on noin 40 000 ja sillä on tehty myös lauluja, kuten Dolchamarin levyt.

Erkin mukaan esperanto on yksinkertainen, joustava, elävä ja ilmaisurikas kieli. Airan mukaan toisten kielten osaaminen helpottaa esperanton oppimista.

Puttaalainen ja Forum 24 kirjoittivat talvipäivien ohjelmasta, Yli-Iin Kierikin kivikautisen kylän esittelystä, tutustumisesta Toppeliuksen kirkkomaalauksiin Haukiputaan kirkossa ja nahkiaisten pyynnistä. Kuvituksena näissä kolmessa lehdessä oli henkilökuvaa Röntysten pariskunnasta sekä Puttaalaisessa ollut kuva talvipäivien avajaisista.

Oulu-lehdessä haastateltiin oulunsalolaista Auli Vihermää hänen esperantoharrastuksestaan. Aulin mielestä kielen opiskelevan pitää olla hieman erilainen ja avarammin ajatteleva. Ei voi miettiä, mitä hyötyä kielestä on. Esperanto ei ole poroporvarin harrastus.

Auli oppi esperanton kotonaan Turussa isältään, joka oli sen innokas harrastaja. Heillä kävi ulkomaalaisia vieraita, mikä oli siihen aikaan harvinaista, ja Auli oppi keskusteluista esperanton muun ohessa. Hän toimi 10-vuotiaana esperanton avulla kaupungilla vieraitten tulkkina. Vuonna 1976 Auli Vihermä opetteli kielen uudelleen ja ei ole sitä sen jälkeen hylännyt.

Esperanto ei saavuttanut sitä käyttöä, mikä kielelle alunperin suunniteltiin kansainvälisenä yleiskielenä, ja vaikka Euroopan parlamentin jäsenet suhtautuvat kieleen periaatteessa myönteisesti, Auli ei usko, että se saisi kansainvälisesti merkittävän aseman. ”Tämä on minulle mukava harrastus, eikä mikään juhlallinen asia”, hän sanoi.

Esperantossa on hyvää sen yksinkertainen kielioppi, ääntäminen ja kehittäminen muiden kielten pohjalta. ”Alkeet oppii nopeasti, mutta täydellisen kielitaidon oppimiseen pitää opiskella kunnolla”, sanoi Auli.

Esperantoa osaavia on maailmassa miljoonia, ja aikaisemmin rautaesiripun takana esperanton harrastus oli henkireikä ulkomaailmaan. Kieltä kehitetään omassa, erityisessä organisaatiossa.

Väitetään, että vitsit ovat esperantoksi hausempia kuin muilla kielillä sen ilmaisurikkauden

vuoksi. Esperanto-kirjallisuudesta jutussa mainitaan Kalevala, Eija Salovaaran esperantoksi kirjoittama *Kie boacoj vagadas* sekä musiikkia tehnyt Dolchamar. ”Kirosanoja esperantoksi en tunne,” Auli kertoi, ”kertoisin kyllä, jos tietäisin”. Kuvituksena jutussa oli Aulin henkilökuva.

Oulu-lehdessä oli lyhyt maininta Syyspäivien ajankohdasta ja ohjelmasta.

Haukiputaan kunnan tiedotuslehdessä, Tilitorissa, esiteltiin EAF:n syyspäivien ohjelma, tutustumiset paikallisiin nähtävyyksiin sekä seurakunnan kanssa toteutettu kirkkokonsertti. Syyspäivien aikana kaksi kertaa järjestettävä esperantoon tutustumisen alkeiskurssi mainittiin lehdessä, samoin tapahtuman järjestelyistä vastaavan Oulun Esperantoseuran jäsenet.

Tilitorissa oli omana juttuna esperanton esittely, sen historia, käyttö ja levinneisyys, siinä mainitaan mm. kielen toimivan keskustelu-, kirjoitus- ja tiedekielenä siinä missä äidinkieletkin. Kielen rakenne on yksinkertaista ja loogista, mikä tekee siitä helposti opiskeltavan. Sanasto on kansainvälistä ja sitä sekä kieltä kehitetään jatkuvasti. Tilitorin mukaan kieli on kaikille sen käyttäjille vieras kieli, jonka vuoksi he ovat ta-saveroisia keskinäisessä kielenkäytössä.

Rantapohja-lehdessä kerrottiin, kun EAF:n puheenjohtaja mainitsi järjestön ensi vuoden 100-vuotisjuhlista, Esperanton Maailmanliiton päämajan johtaja Osmo Buller kertoi esperanton käytöstä maailmalla tällä hetkellä ja Haukiputaan valtuuston varapuheenjohtaja Mirja Vehkaperä esitti kunnan tervehdysten. Lisäksi kerrottiin tutustumisesta paikallisiin nähtävyyksiin, Toppeliuksen maalauksiin Haukiputaan kirkossa, Kierikin kivikautisesta kylästä, nahkiaisten pyynnistä sekä urkutaiteilija Esa Toivolan kirkkokonsertista. Esperantistien lauluillassa hotelli Samantassa esiintyi Olli Pajula sekä ruotsalainen Johan Ölund ja latvialainen Andrei Teräväinen. Rantapohjan jutun kuvassa haukiputaalainen Ilkka Huttu esitteli nahkiaisen pyyntiä Haukiputaan Niemeläntörmällä syyspäivien

osallistujille.

Kansan Tahdossa oli syyspäivien ohjelman ennakkoesittely, jossa kerrottiin tapahtuman kiertoajelusta, urkukonsertista sekä esperanton tutustumiskursseista hotelli Samantassa.

Kesän alussa ilmestyneessä Kesä Kaleva 2006:ssa esiteltiin automatkailijoille pysähtymispaikaksi Taivalkosken Metsäkylässä olevaa Esperanto-keskusta. Kielen toi kylälle Aini Vääräniemi, ja sitä voi kuulla puhuttavan kyläkaupassa sekä kylällä järjestettävissä kieli-illoissa. Metsäkyläläiset ovat osallistuneet usein Esperanton maailmankongresseihin eri puolilla maailmaa.

Perniönseudun lehdessä kirjoitettiin Salon kirjastossa pidetystä Salon Esperantoseuran kokouksesta, jossa avattiin maamme esperantoseuroissa kiertävä Suomen Esperantoliiton 100-vuotisjuhlalaatikko. Siinä esitellään EAF:n 100-vuotisjuhlaa, joka järjestetään 27.4.2007 Helsingissä. Salon seuran puheenjohtaja Eero Saari kaipasi järjestön toimintaan lisää väkeä, varsinkin nuoria. Kemiössä järjestetään 2006 joulukuun puolivälissä esperantokurssi.

Eero Saari opiskeli 1950-luvulla esperantoa Salon kurssilla, ja tuolloin perustettiin myös paikallinen esperantoseura. Kurssilla oli 22 osallistujaa.

Perniönseudun lehti kertoo myös Suomen Esperantoliiton puheenjohtajan Anna Ritamäen tutustumisesta kieleen 17-vuotiaana partiolaisena. Hän opiskeli alkeita kirjoista ja liittyi Suomen Nuorten Esperantoliiton jäseneksi sekä kävi jatkokurssin. Annan äiti Carola Antskog toimii aktiivisesti esperantistien parissa ja tutkii liiton historiaa. Hän on vetänyt Strasbourgiiin suunnattuina nuorten esperanto-matkoja.

Anna mainitsee esperanton opiskelun olevan mahdollista internetissä sivulla [www.Lermu.net](http://www.Lermu.net).

Jutun lopussa on parin lauseen tekstinäyte esperanton kielestä. Lehden kuvassa Helsingin esperantoseuran puheenjohtaja Jukka Pietiläinen luovutti juhlalaatikon Salon Eero Saarelle.

*Jukka Noponen*

## Kristnaska prediko

Mi revenis el eksterlando meze de oktobro per avio de granda finnlanda kompanio. La granda jeto flugis ĝis Helsinki, kaj mi daŭrigis la vojon al Turku en malgranda duhelica flugmaŝino. Ĝi apartenis al estona kompanio kontrakte trafikanta por kaj parte posedata de la finnlanda kompanio. La pasaĝerojn akceptis juna stevardino, afabla sed laca. Ŝi avizis pri sekureco, kontrolis zonojn kaj dum la mallonga flugo servis bombonojn.

La stevarda personaro ne estas unuavice por komfortservoj de pasaĝeroj, sed tiuj laborantoj devas troviĝi en la aviadiloj pro sekurecaj motivoj. Certan kvanton da laborantoj postulas la ŝtataj sekurec-kontrolaj instancoj. La kompanioj do ne povas ŝpari laborkostojn per malmultigo de aviadila personaro sub certan nivelon.

Sekve estas ŝpareblecoj nur sur merkato, kie homlaboro estas varo aĉetata. Flugkompanioj bezonas ŝpari por konkurenci inter si. La kontrakta daŭriga flugo apartenas al tiu ŝpariga reto. Estonio situas en la eŭropa ekonomio, sed aliloke. Negoco bezonas sufiĉan breĉon inter kostoj kaj elspezoj.

La semajnon post la duparta flugo oni aŭdis, ke la finnlanda flugkompanio proponis al novdungotoj kondiĉojn similajn al tiuj de la estonaj kolegoj. Tio signifus trionan ŝparon de kostoj kaj rompon de la finnlanda sistemo de ambaŭflanka interkonsento pri laborkondiĉoj, koncer-

nantaj ĉiujn dungitojn laborantajn en la lando. Rezultis striko de la finnlandaj gestevardoj, daŭrinta nur du tagojn kaj finiĝinta venke al la laborantoj.

En sekvaj semajnoj oni sciigis pri kelkaj skandaloj koncerne dungon, laboron kaj kondiĉojn. Laŭ la finnlanda leĝo la lokaj rajtoj kaj kolektive interkonsentita minimuma salajro koncernas ĉiujn. Estis malkovritaj pluraj laborejoj, kie eksterlandaj firmaoj fakturis lokajn prezojn kaj pagis al siaj laborantoj laŭ siaj tarifoj, aŭ kie finnlandaj firmaoj nigre dungis eksterlandanojn kaj dumpis laborojn, malfavore al honestaj entreprenistoj. Plej vaste tio okazas en la konstrua kaj ŝipkonstrua industrio, kaj ankaŭ en iuj branĉoj de la servoproduktado – kie en familiaj entreprenoj foje oni kontraŭvole estas familiano. En Turku estis malkovrita litova firmao, kies dungitoj laboris por 1,50 eŭroj po horo – kaj devis vivteni sin en Finnlando! Kelkaj krimuloj kulpaj pri homvendado estis kaptitaj; fenomeno kies ekziston en Finnlando oni ĝis nun emis nei.

Ĉio ĉi estas fenomenoj de tutmondiĝo. Tio estas speco de internacia vivo. Ni esperantistoj difinas nin internaciuloj. Kia estas nia rilato al diversaj manifestiĝoj internacia, transnacia, tutmonda vivo, estas esenca diskutajo en nia Esperantujo, idilia, tamen situanta en mondo reala.

*Tuomo Grundström*

### ÅRHUNDRADETS JULKLAPP!

Världens första skiva helt å transpiranto!

*Happi Kvam Pippi*

Manskörsmusik å transpiranto framförd av Akademiska sångföreningen, Helsingfors

Beställ den å [www.gronkoping.nu](http://www.gronkoping.nu)  
eller å telefon 0736-87 21 18



*Akademiska Sångföreningen (www.akademen.com), la plej malnova koruso en Finnlando, transiris al transpiranto: Nova KD “Happi kvam pippi” aperis en novembro.*

*Legu pli pri la ŝerca lingvo sekvanumere!*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 [kari.kettunen@pp1.inet.fi](mailto:kari.kettunen@pp1.inet.fi)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Ojalanperäntie 47, 90860 Halosenniemi. [olli.pajula@dnainternet.net](mailto:olli.pajula@dnainternet.net)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 [markku.saastamoinen@jippii.fi](mailto:markku.saastamoinen@jippii.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2007 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnalaisille esperantisteille voi lähettää postia osoitteella: [sarastamo@gmail.com](mailto:sarastamo@gmail.com) tai Esperantogrupeto Verda Ilo, c/o Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2007**  
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
1	10.1.	15.1.	5.2.
2	10.3.	15.3.	5.4.
3	10.5.	15.5.	5.6.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ♦ Anoncprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

## Aleksas J. Masjukas – in memoriam 1930–2006

Murmanskin esperantotoiminnan monivuotinen moottori ja UEA:n edustaja – delegito – on kuollut 2006-08-20. Tietävästi liettualaisperäinen Aleksas tuli suomalaisille tutuksi mm. Tampereen maailmankongressissa sekä EAF:n talvipäivillä Rovaniemellä 2000-03-18, jolloin hän esiintyi myös soittaen haitaria (kuva). Osanottomme hänen perheelleen.

*pema-z*




## William Auld – in memoriam 1924-11-06 – 2006-09-11

Esperanton kielen käyttäjien keskuudessa kielen suunnittelijan jälkeen kenties toiseksi tunnetuin hahmo on siirtynyt muistojen maailmaan. Sota-ajan lentäjä, siviilissä opettaja, esperantomailmassa suurtoimija, kolmikielinen runoilija, kirjailija, kääntäjä, toimittaja, Nobel-ehdokas – valitettavasti hänen tuotantoaan ei ollut käännetty ruotsiksi – eikä paljon suomeksikaan, mutta tässä pienen pieni näyte:

### *Elämä*

*Karuselli on elämä tää: / meno luja, ei määränpää: / Vauhti kun kerran lopahtaa, / saa meidät tomuinen maa.* (käännös: pema-z)



### **Seuraava numero ♦ Venonta numero**

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Jutut 15.1.2007 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en februario. Artikoloj ĝis 15.1.2007 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.